

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2013 numero 3-a: julio-oktobro 2013
dissendo je la 15-a de aŭgusto



Al admiro de la alpa flaŭro !





La premiitoj pro la bunteco de siaj vestaĵoj : Charlotte Blanc Maillard, Verena Chaves-Walder, Dieter Rooke kaj Dorothee Baumgartner. La ĵurio : Sonia Daubercies, Carlo Baumgartner kaj Nelida Weidmann. Kaj la prezidantino Mireille Grosjean.



La Markhalle en Altenrhein konstruita de la artisto Hundertwasser.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,
CH-2300 La Chaux-de-Fonds
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch
Tel. : hejme: 032 926 52 32
êe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller.

Redaktaj datlimoj

2013-4 : novembro-decembro :
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.
2014-1 : januaro-februaro :
decembre 15, dissendo 10-an de januaro.
2014-2 : marto-junio :
februare 10, dissendo 1-an de marto.
2014-3 : julio-oktobro :
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Marie-Louise Mûnger, Rue Centrale 4, 2112
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Komisiito pri financoj : Hans-Werner
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Kontonumero de SES (POSTFINANCE)

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds
17-581908-4
(por kotizoj kaj donacoj)

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch



Vivo de SES

Redaktis Claude Gacond

Protokolo de la Ĝenerala Asembleo 2013

okazinta la sabaton 23an de marto 2013

en Staad (SG) ĉe la Hotelo Weisses Rössli (blanka ĉevaleto), oriente de
Sankt Gallen

Komenco je 11h05. 28 membroj partoprenas la asembleon, ĉeestas unu gasto.

1. Bonvenigo, nombrado de ĉeestantoj. Anonco pri senkulpiĝoj : Marie-Louise Münger, Stefano Keller, Luc Allemand, Alain Favre, Ueli Haenni, Jean-Thierry von Büren, Benno Frauchiger, Andrée Gacond, Arlette di Vetta, Hans Kästli, Jaqueline Vasserot, Ernst Glättli.

Mireille Grosjean, kun-prezidanto de SES, gvidas la kunvenon. Ŝi anoncas, ke la kunveno estas registrata.

Ŝi anoncas, ke venis propono kun subteno de Bruno Graf, André Sandoz kaj Nancy Fontannaz kaj ke tiu dokumento estos traktata en la punkto 14.

2. Aprobo de la tagordo. Ĝi estas aprobita.

3. Elekto de protokolanto. Neniu anoncas sin. La plano B estas, ke per registrado Nelida Weidmann verkos ĝin.

4. Elekto de la voĉnombrantoj. La asembleo elektas Dominique de Mestral. Voĉrajtaj membroj estas 28.

5. Evoluo de la membraro. Stabila nombro. Silenta minuto okazas memore al S-ro Armin Weidmann, la patro de nia kun-prezidanto Dietrich Weidmann.

6. Aprobo de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2012. Ĝi estas aprobita.

7. Vivo de la societo : aprobo de la estrarraporto. Gratuloj aŭdiĝas. Raporto aprobita.

8. Konsisto de la estraro. La estraro konsistas el 4 personoj. Demisiis Stefano Keller, la sekretario. Ni nun kunvenas per skajpo. SES tiel ŝparas la luadon de kunvenejo kaj la vojaĝkostojn de la membroj. Ni diskutas per skajpo en Môtiers (NE) kaj Uster (ZH). Ĉiun duan monaton okazas kunveno tia. Ni deziras trovi novan sekretario. Nia komisiito pri financoj Hans-Werner Grossmann bonege zorgas pri niaj financoj. Tamen li jam diris, ke ni devas esplori pri nova kasisto. Ni devas trovi 2 novajn personojn.

Nicole Margot: Ĉu iu el la estraranoj povus zorgi pri sekretariaj taskoj?

Respondo: Estas tre valoraj diskutoj inter ni 4. Tamen laboras ĉefe Mireille Grosjean. Pli bone ni estu 5 pro voĉdonaj situacioj. Bonvolu pripensi. Estas tre efika skipo en la aĝo de 35, 40 jaroj, kiel Laurent Burgbacher, Benno Frauchiger, Veronika Pochanke, kaj aliaj, sed ili estas tre okupitaj pro familio kaj profesio. Apude estas junuloj kiel Luc Allemand kaj ceteraj. Apude estas infanoj. De tie ne venos helpo por la estraro.

Se vi vidas ian eblon, bonvolu diri tion al la estraro.

9. Elekto de komisiito pri ĝemelaj urboj. SES estas Landa Asocio (LA) de UEA. Sinjoro Wu el Ĉinio zorgas por UEA pri tiu temo. Li sugestas al la LA-j havi komisiiton pri ĝemelaj urboj.

Istvan Morocz raportas pri provoj inter Zuriko kaj Kunming, Ĉinio. Li pretis iri al Ĉinio. Neniu povis komenci, neniu respondo venis el Kunming. Tia agado ne pliboniĝos.

Mireille Grosjean rimarkigas, ke la movado en Kunming ne agadas, ĉu mortis?

Morocz rimarkigas, ke tiu fiasko negative efikis ĉe la urbaj instancoj de Zuriko.

Mireille Grosjean raportas pri la peto de la arta kolegio de Kunming por akiri profesorojn por la kolegio. Ŝi intencas iri al Zuriko por esplori pri tiu peto.

Neniu anoncas sin por tiu posteno de komisiito pri ĝemelaj urboj.

Oni devus vere sekvi la sukcesajn agadojn.

Nicole Margot: Unue ĉiuj devus informiĝi, kun kiu lia/ŝia urbo estas ĝemeligita.

Mireille Grosjean : En ĉiu urbo estas respondeculo pri eksteraj rilatoj aŭ kultura “ministro”. En Le Locle estas asocio por tio. Bonvolu kontroli, ke viaj ĝemeliĝoj aperu en eo.wikipedia.org. Tiurilate ŝi laŭdas la laboron de Dietrich Weidmann, kiu dediĉas tagojn kaj noktojn al wikipedia. Se la membroj ne mem povas meti la informojn en la reton, bonvolu informi Mireille Grosjean aŭ Dietrich Weidmann. La komisiito devus kolekti la pozitivajn paŝojn kaj raportoj pri ili.

Dietrich Weidmann : unue esploru, ĉu estas esperantistoj en la ĝemela urbo de via loĝloko. Poste iu iru al sia urbestro. Tiel ni povus krei la kontaktojn.

Mireille Grosjean : raportu pri tio, kio okazas ĉe vi en via urbo kaj tiuj raportoj aperu en nia retejo. Ĉu per esperanto aŭ ne. Ĝenerale : oni devas nutri tiajn kontaktojn, sekvi, evoluigi. Raportu pri bonaj, pozitivaj, sukcesoplenaj agadoj. Tio donas ideojn al aliaj.

Decido : Ni elturniĝos sen komisiito.

10. Financoj. Prezento de la jarkalkulo 2012 kaj aprobo de ĝi.

Elisabeth de Mestral: Kiel vi elspezis CHF 5000.- por varbado ?

Mireille Grosjean : ni aĉetis en Francio amason da informiloj. Ŝi kunportis stokon al Staad, prenu kaj disdonu. La estraro rezignis pri verkado de informiloj kaj decidis aĉeti en Francio. En Germanio ni atendas la novan eldonon, kiu havos ĝustajn informojn pri Svislando. Ŝi sendis stoketon al membroj en decembro 2012 ; pluraj membroj ĝuis kaj dankis. Ni aĉetis paĝon en la revuo IRO de romandaj inventistoj (CHF 1800.-).

Kutime ni metas CHF 5000.- por informado; ofte ni ne elspezas tiun sumon kaj pro tio membroj grumblas. Nun ni uzis la sumon. Daŭre ni fotokopias informilojn.

Claude Gacond : La eldonado de *SES informas* parte iras al la konto “informado, varbado”. Tio fideligas novulojn.

Elisabeth de Mestral : Ĉu SES subtenis la festotagon en CDELI pri la 125-jariĝo de Esperanto ?

Mireille Grosjean : Jes.

Raporto de la kaskontrolantoj : Barbara Pochanke laŭtlegas ĝin. Ĉio en ordo. Rimarkoj de la kontrolantoj : Mankas fakturo pri la laboro rilate al agado por la elsendoj de Dr Baur. Vidu la punkton 15. SES denove subtenis KoToPo en Lyon, Francio.

Mireille Grosjean klarigas pri la taskaro de KoToPo kaj evoluo de la situacio tie. Mario Bélisle laboras tie nuntempe same kiel Luc Allemand.

Voĉdono pri financa raporto : Kontraŭ : 0. Sindetenoj : 0. Por : 28.

11. Elekto de kaskontrolantoj.

Por 2013-2014 Dieter Rooke kaj Barbara Pochanke konsentas pludaŭrigi sian mandaton. Ĉu estas aliaj kandidatoj ? Ne. La membraro aprobas per aplaŭdo, ke tiuj du personoj plu laboru.

12. Projektoj por 2013 :

a) Grundtvig-projekto pri interkulturaj rilatoj : okazos staĝoj en Barcelono kaj Bordeaux ; niaj membroj povas partopreni kaj ricevi repagon de vojaĝkostoj (Vidu diversajoj 2).

b) SAT : peranto estas Richard Schneller. SAT-Amikara kongreso en Métabief, franca Ĵuraso : peranto estas Mireille Grosjean.

c) Tutmonda sesio de KER ITK-ekzamenoj. Ĝi okazos la 8an de junio en La Chaux-de-Fonds. Mónica Molnár respondecas. (Vidu diversajoj 1).

d) Postsomera kunveno : sabate 31an de aŭgusto 2013 en Bielo.

e) SFERO 2013 okazos en Langnau, Emmenthal, organizata de Vera Pochanke, Laurent Burgbacher kaj Marion Bélisle. Ĉiuj estas bonvenaj. SFERO 2014 okazos laŭ la propono de Nelida Weidmann. Plano estas konkurso por junaj muzikgrupoj, ke ili kantu unu kanton en esperanto. Vidu punkton 15.

13. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI sekcio), SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo k.c. La gvidantoj ne traktas aparte tiajn strukturojn pro la tempomanko.

14. Afrika Kongreso de Esperanto (AKE).

Mireille Grosjean informas. Kelkaj el vi iras al UK-oj. Vi povas pagi flugon kaj akiri vizon. Afrikanoj ne obtenas vizon al Eŭropo. Ni ignoras la agadon en Afriko ĝenerale. Jam okazis 4 afrikaj kongresoj. La lasta okazis en 1994. Mireille Grosjean fondis « Scio Sen Bariloj », efikan asocion. Ĉar afrikanoj ne povas veni kaj kunveni, ni devas iri al ili. Ideo estas partnerado. Nordaj LA subtenas LA-n en Afriko, tiel afrikanoj povas akiri vizon al Benino kaj veni kaj partopreni. Ni diskutas hodiaŭ pri tio ; en ĉiuj aliaj LA okazadas la samaj diskutoj. Eble ni estos 20, eble 50... depende de la subteno. Baza ideo de la estraro de SES estas, ke niaj membroj subtenu SES-n por ke SES povu pagi CHF 5000.-.

Letero de Bruno Graf, André Sandoz kaj Nancy Fontannaz estas laŭtlegata de André Sandoz (resume : tia subteno ne kongruas kun nia statuto kaj ties celoj. La sumo estas tro alta. La investo ne estas daŭripova. UEA kaj Afrika Komisiono devas zorgi pri tio. Kolekti tian sumon estas malfacila tasko. Ĉu ne estus svisaj projektoj por tia investo ? Subteni la junularon ? subteni CDELI-n ? Ni proponas subtenon al AKE per CHF 2500.-).

Claude Gacond : ni devas alvoki al niaj membroj. Dietrich Weidmann subtenas lin.

Nicole Margot : CHF 2500.- estas tro alta sumo.

Dietrich Weidmann : Ni devas decidi, ĉu ni entute subtenos AKE-n, kaj se jes, per kiom da mono.

Voĉdono : ĉu SES subtenu AKE-n ? Por : 17. Kontraŭ : 5. Sindeteno : 5.

Pri la sumo : Propono Mireille Grosjean : CHF 5000.- (por : 1, sindetenoj : 3, kontraŭ : 24).

Propono Graf-Fontannaz-Sandoz : CHF 2500.- (por : 8, kontraŭ : 15, sindeteno : 3).

Propono Fontannaz-Gacond : CHF 1000.- akceptita. La akceptita propono pri CHF 1000.- antaŭvidas krom la CHF 1000.- el la ĝenerala kaso, kreon de kontolinio en nia librotenado por Afrika Kongreso, kiun nutru donacoj de la membroj. Al donacoj por tiu konto SES ĝenerale alvoku. Depende de tiuj donacoj espereble la sumo de CHF 1000.- konsiderinde plialtiĝos.

15. Buĝeto 2013. Prezento kaj aprobo.

SFERO 2014 okazos laŭ la propono de Nelida Weidmann. Plano estas konkurso por junaj muzikgrupoj, ke ili kantu unu kanton en esperanto. Nelida Weidmann anoncas, ke ŝi bezonas helpon por tiu plano. La grupoj devos traduki sian kanton al esperanto, ni devos helpi en tio. Dominique de Mestral konsentas helpi. Ni metis CHF 3000.- por tiu agado. Ni trovis tre taŭgan domon en Vordemwald (AG) laŭ sugesto de Wolfram Fischer. Detaloj sekvos. En la kontolinio 3020 estas CHF 3000.- por tiu projekto. En 2013 tiu sumo estu blokita por SFERO 2014.

Mireille Grosjean informas, ke SES ricevis de Claude Gacond fakturon pri la laboro de Stefano Keller por enretigi la elsendojn de Dr Baur. La Ĝenerala Asembleo 2012 en Vevey decidis uzi CHF 9500.- por tiu laboro.

Elisabeth de Mestral atentigas, ke restos ne multe da mono por agi en 2014.

Nancy Fontannaz proponas, ke ni petu repagon de la KCE-a ŝuldo. Pro la decido de 2012 la membroj ne eniras tiun vojon. Pasintjare estis decido, ke SES nenion donacu al KCE.

Dietrich Weidmann : Se la membraro decidas pli malkreskigi la elspezojn, mi tuj forlasos mian postenon. Mi volas agadi en asocio, kiu uzas monrimedojn.

Propono de Nancy Fontannaz : redukti per pliaj CHF 1000.- la linion 3020. Do redukti la subvencion de SFERO de CHF 3000.- al CHF 2000.-. Post kelkaj klarigoj Nancy Fontannaz reprenas sian proponon.

Pro la redukto de la subvencio al AKE la linio 3020 iras de CHF 8000.- al CHF 4000.- Konsekvence la plielspezoj malkreskas de CHF 20550.- al CHF 16550.-.

Voĉdono pri la buĝeto 2013 : Kontraŭaj voĉoj al la buĝeto : 0. Sindetenoj : 4. Buĝeto akceptita per 24 poraj voĉoj.

Diversaĵoj

1. Mireille Grosjean informas pri la tutmonda sesio de KER-ekzamenoj. Ŝi mem partoprenos en Lyon. Ŝi anoncas, ke sesio okazos ĉe CDELI en La Chaux-de-Fonds. Claude Gacond favoras tiun ekzamenon, sed li riproĉas, ke li ne estis informita pri la okazigo en CDELI. La organiza hierarkio ne estis respektita.
2. Rekomendo partopreni en Bordojo, Francio, al kunveno de UFE kaj de fervojista asocio, maje, ĉieliro de Jesuo. En rilato kun Grundtvig-projekto www.noos.ch/ideo.
3. Dietrich Weidmann lanĉas la ideon pri kreado de laborgrupo por verki novan artikolon 3 “Celoj” de SES. Nia statuto devas kongrui kun la statuto de UEA. Anoncas pretecon kunlabori : Nelida Weidmann, Mireille Grosjean, Dietrich Weidmann, Dieter Rooke. Tiu laborgrupo proponos novan tekston prezentotan por la Ĝenerala Asembleo 2014.
4. Aliĝu al nia retlisto !! Iu povas fari tion mem sur nia retejo www.svisa-esperanto-societo.ch. Venas rapide novaĵoj.
5. “*La Zamenhof Strato*”, elstara libro de Roman Dobrzynski. Legu ĝin en Esperanto ! Ĝi ankaŭ ekzistas en la franca kaj germana. Donacu ĝin !
6. Ni povus iel festi la 100-an datrevenon de UK en Berno 1913 (laŭ sugesto de Benno Frauchiger). Decidita estas agotago sabate la 24an de aŭgusto 2013.
7. Claude Gacond anoncas, ke en la jaro 2014 CDELI fariĝos 50jara.
8. Prelego de Profesoro Kimura pri la katastrofoj en Japanio kaj manieroj ŝpari energion; la prelego okazos en Salle Cécilia en Les Brenets (NE) (3-minuta piedirado el la stacidomo) dimanĉe la 23an de junio je 14:30. Ne maltrafu !
9. Lokaj grupoj ekzistas. Estus bone havi kontakt-personojn en diversaj lokoj, sen klubo, sen statuto, neformala kontakto.
10. ZEOj en Svislando baldaŭ aperu en nia retejo. Mireille Grosjean fotis ĉiujn. Ŝi sendos ĉion al Stefano Keller, kiu okupiĝas pri nia retejo.
11. Nicole Margot : Jen numeroj de la revuo *ETNISMO*.

Fino de la kunveno je 12h55.

Protokolis Mireille Grosjean.

-oOo-

Vestopremiado post bongusta tagmanĝo

Post la duhora laŭstatuta kunveno ĉiuj ĝuis pri bongusta tagmanĝo en la restoracio Weisses Rössli kaj dum la kafumado la ĵurio de la konkurso, Nelida Weidmann, Sonia Daubercies kaj Carlo Baumgartner, disdonis 3 premiojn kaj la tuta grupo de la 29 manĝantoj decidis pri la lasta premio en gaja etoso. Al nia grupo aldoniĝis 3 gastoj, inter kiuj 2 samideanoj el Aŭstrio.

(Vidu sur la paĝo 2a foton de la premiitoj pro la bunteco de sia vestado.)

-oOo-

Sekve al mallonga promenado ni atingis la mirindan konstruaĵon Markthalle, verko de la artisto Hundertwasser: Tie disvolviĝis paska bazaro kun multaj butikoj. La koloroj de la artaĵoj kaj de la domo ĝojigis nin. En tiu bunta etoso nia koruso kantis en esperanto kaj multaj vizitantoj miris kaj tre ŝatis tion. Kaj inter tiuj ĉeestantoj tute hazarde ni renkontiĝis kun sinjorino Edith Lösch-Liechti, la filino de nia forpasinta samideano Fritz Liechti el Zuriko.

(Vidu sur la paĝoj 2a kaj 39a dank'al koloraj fotoj la neordinarecon artan kaj koloran de la Markthalle de Hundertwasser el ekstero kaj interne, kaj samtempe admiru la kantan entuziasmon de niaj korusanoj.)

-oOo-

La prezidantino Mireille Grosjean konkludis tiun belan renkonton en orienta Svislando anoncante, ke la Postsomera Renkontiĝo okazos sabate la 31an de aŭgusto en Biel/Bienne kaj ke la venontjara Ĝenerala Asembleo de SES organizota de Sonia Daubercies kaj Charlotte Blanc Maillard kunvenigos nin iun dimanĉon en Yverdon-les-Bains.

-oOo-

Grava novaĵo

En majo 2013 Mireille Grosjean akceptis plu deĵori en la Komitato de UEA kiel Komitatano A, tio kiel reprezentanto de la Landa Asocio Svisa Esperanto-Societo. Temas pri ŝia sesa mandato. Tiurilate oni sciis, ke SES ne repagas al la Komitatano A ĉu flugon, ĉu restadkoston, nur la kongreskotizon.

Novaja okazis en Herzberg, Germanio, dum la 46a ILEI-Konferenco : la Komitato de ILEI elektis ŝin kiel prezidanton de ILEI. Gratulon al Mireille Grosjean.

Sed ĉar ILEI rajtas havi Komitatanon A en la Komitato de UEA, do la Komitato de ILEI decidis, ke ŝi estos Komitatano A nome de ILEI por la mandato 2013-2016. Kaj tial siaflanke la estraro de SES decidis, ke nun la Komitatano A nome de Svislando estu la kun-prezidanto Dietrich Weidmann.

Donacoj al SES en CHF

Januaro-februaro 2013 : Maria Benvenuti : 30, David Buhlmann : 70, François Huguenin : 15, Jean-Jacques kaj Eliane Lavanchy : 50, François kaj Chantal Perret-Gacond : 3, Françoise Pétermann : 25, Annemarie Pokorny : 15, Ambassade du Soleil : 5, Paul Scherer : 15, Adrian Tanner : 30, Erich Werner : 50, Richard Wilson : 20. Sume : **CHF 328.**

Marto-aprilo 2013 : Jimmy Rivière : 30, Laure Bornet : 15, Alois Koller : 30, Yvette Humbert-Fink : 15, Traugott Rinaldo Aebi : 5, Ernst Glättli : 15, David Bühlmann : 40, Laurence Aïdonidis Laurence Ducret : 135, Marc Vigny : 15, Elisabeth Eisenegger : 15. Sume : **CHF 315.**

Majo-julio 2013 : Georgette Friedly : 15, Tazio Carlevaro : 50, Noël Huguenin : 20, Ambassade du Soleil : 10, David Buhlmann : 40. Sume : **CHF 135.**

Donaca stato je la 31a de julio 2013 : Sume : **CHF 778.**

Nome de SES dankas al la malavaraj donacintoj Hans-Werner Grossmann.

-oOo-

Dua Tutmonda KER-ekzameno

Kategorio: Edukado 2013-06-10 22:55:02



Katalin Kováts, redaktoro de www.edukado.net - simile al la pasinta jaro - denove sukcesis kunlaborigi ĉirkaŭ 70 personojn el 16 landoj por okazigi samtempan ekzamen-sesion tra la tuta mondo. Gratulon al ŝi kaj al ŝiaj kunlaborantoj.

Al la ekzameno aliĝis 250 kandidatoj, el kiuj fine ekzameniĝis 243. Unu polo kaj 6 rusoj ne aperis en la indikita tempo.

La kampanjon partoprenis 24 urboj, laŭalfabete kun la koncerna nombro da ekzamenatoj : *Arras 17 - Avinjono 8 - Berlino 7 - Bonaero 7 - Gento 12 - Helsinko 8 - Kalio 8 - Kuritibo 13 – La Chaux-de-Fonds 9 - La Roche-sur-Yon 13 - Limoĝo 12 - Liono 9 - Maceio 11 - Managvo 7 - Malmo 5 - Moskvo 14 - Parizo 9 - San Francisko 7 - Senta 9 - Tecamac 36 - Tijuana 4 - Tokio 5 - Tuluzo 8 - Varsovio 5.*

Plej multe da kandidatoj varbiĝis denove en la meksika urbo Tecamac. Kun admiro sekvindas la fruktodona laboro de la loka esperantista teamo.

En ses lokoj okazis ne nur skriba parto, sed helpe de skajpo, eblis ankaŭ trapasigi la parolan parton de la ekzameno. Tio estis la kazo de La Chaux-de-Fonds. Por tio ĉiurbe kunligiĝis la ekzamenloko kaj du ekzamenantoj el diversaj landoj. La lokajn teknikaĵojn kaj sekurecon prizorgis la organizantoj, dum la ekzamenantoj laboris el sia hejmo. Tiel eblis ekzemple ekzameni 15 meksikanojn, kun kiuj Katalin el Hago, Márta Kovács el Budapeŝto, alifoj Petra Smidéliusz el Bonaero sidis ĉe la komputilo. Skajp-ekzamenis ankoraŭ aliloke Renato Corsetti, Zsófia Kóródy kaj el Liono surloke ankaŭ Mireille Grosjean. En La Chaux-de-Fonds kaj Tuluzo tiaj sesioj okazis 1-2 semajnojn post la skriba parto.

Krom kelkaj etaj teknikaj defioj kaj malkonektiĝoj la skajpa ekzameno mem teknike tute bone “ekzameniĝis”, kaj tio malfermos novajn eblojn por la okazigo de kompleksaj ekzamenoj tra la mondo sen vojaĝigo de la ekzamenantoj.

La testojn oni skribis en du geografiaj blokoj, eŭropanoj kune kun japanoj, kaj usonanoj kune kun latinamerikanoj. Ni uzis du seriojn el ĉiuj tipoj kaj niveloj, entute 12 testojn. Aldone je ĉiu nivelo ni devis pretigi grandliterajn versiojn por la anoncitaj vidhandikapaj kandidatoj.

Ĉi-jare ankaŭ en la sendado de la dokumentoj estis novaĵoj. En Usono kaj Latin-Ameriko en tri diversaj lokoj oni produktis la materialojn surloke kaj tiel ĉefe enlande sendis la kovertojn al la adresatoj. Ĉiuj aliaj testkovertoj kaj pakaĵoj estis pretigitaj en Hago kaj senditaj el Nederlando. La materialoj – krom tiu de Rusio - atingis siajn celojn ĝustatempe. Por Moskvo necesis apliki B-planon, lastmomentan elektronikan sendadon.

Por tiu ĉi sesio estis kompilitaj proksimume 200 paĝoj da testoj. Bedaŭrinde - pro aliĝo de kandidato, kies artikolo origine enestis en iu testo - necesis lastmomente ŝanĝi la materialojn. Tial ĉe la enpaĝigo enŝteliĝis 3 eraroj en la koncernan dokumenton. La misnumerigadon de du taskoj, helpe de la surlokaj gvidantoj, en ĉiu loko oni flekse kaj rapide solvis, ĝi kaŭzis problemojn - aŭ pli precize vekis akrajn kritikojn - nur inter kelkaj junaj kandidatoj de Varsovio kaj Berlino. Bedaŭrinde iliaj mokaj komentoj en Facebook celis ne la perfektigon de la sistemo, sed demoraligon de la ekzameno. La problemo estos raportita al ITK.

La tutmonda kunagado ankaŭ ĉi-jare altiris la atenton de la ekstermovadaj novaĵservoj, en pluraj lokoj ĵurnalisto vizitis la ekzameniĝantojn, kaj sekve de tio unu post la aliaj aperadas pozitivaj artikoloj pri Esperanto post la evento.

En kelkaj urboj ni sukcesis atingi, ke altrangaj lokaj honoraj gastoj estis enplektitaj en la proceduron, ekzemple en Liono la vicurbestro ricevis kaj mem portis la testojn

al la ekzamenloko, poste eĉ ĉeestis la festan restoracian manĝon, kiun la trapasintoj okazigis. En aliaj urboj universitataj profesoroj, lernejoj direktoroj, bibliotekestro kaj direktoro de socia organizaĵo subtenis la aranĝon per sia ĉeesto kaj kunlaboro.

La pretiĝo al la ekzameno por la partoprenintoj signifis sisteman kaj seriozan lernadon de la lingvo. La komuna sperto de la ekzameno fortigas la komunumojn kaj donas okazon je fiero.

Katalin Kováts, la organizinto nun administras la sesion, kolektas per enketilo la surlokajn spertojn kaj pretigos detalan analizon kun notoj pri la plibonigendaj eroj de la aranĝo.

La testpakaĵoj survojis al Budapeŝto, kie en junio kaj julio okazis la korektado kaj taksado. La unuaj rezultoj kaj atestiloj doniĝis dum la UK en Rejkjaviko, kie la du direktoroj de la Budapeŝta Lingvocentro mem enmanigis la dokumentojn al la ĉeestaj kandidatoj aŭ al iliaj reprezentantoj.

Pri la evento pretiĝas resumpaĝo kun ligoj al rilataj filmetoj, artikoloj, listo de kunlaborintoj, statistiko kaj eblo por aldoni komentojn. La paĝo troveblas sub la nomo: [Dua Tutmonda KER-sesio](#).

La organizanto Katalin Kováts kore dankas siajn kolegojn de la prepara kaj ekzamenanta teamo kaj ĉiujn lokajn kontribuantojn, sen kiuj ne eblintus tiu granda, tutmonda aranĝo. Same korajn dankojn ŝi sendas al ĉiuj, kiuj esprimis siajn gratulojn kaj aprezis la faritan laboron.

Kia progreso, ekde la 70aj jaroj de la pasinta jarcento, kiam en La Chaux-de-Fonds kadre de Kultura Centro Esperantista kaj de CDELI mi ekagis kvazaŭ en dezerto, por ke, kunlabore kun ILEI tiam ĉefe okcidenteŭropa, ekokazu esperanto-ekzamenoj. Tial mi ĝojegas pri la nuna efektiva pozitiva disvolviĝo de KER kaj gratulas pro la ĉijaraj sukcesoj al Katalin Kováts kaj ties kreskanta tutmonda kunlaborantaro.

Claude Gacond, honora membro de ILEI.

-oOo-

Loka vivo

Berno

Pri la esperanto-ekspozicio

Finiĝis je la Zamenhofa Tago 15a de decembro 2012 la ekspozicio pri esperanto en la restoracio "*esperanto*" troviĝanta en Winkelriedstrasse 42. Per la tiea montrado de 20 el la afiŝoj pretigitaj de Sonia Daubercies kaj Charlotte Blanc Maillard, tiu ekspozicio, kiel anoncote en *SES informas* 2012-4 inaŭguriĝis la 18an de novembro.

Ne nur klientoj de la restoracio, sed ankaŭ tieaj deĵorantoj, povis tiel ek- aŭ pli-kleriĝi pri la lingvo internacia.

Laŭ peto de s-ro Murat Yilmaz, la restoraciestro, ni ŝanĝis la manieron utiligi la sciigojn de la afiŝoj: Anstataŭ lasi diveni al la vizitantoj, kiu esperantlingva citaĵo afiŝa de famulo kongruas kun kiu el la 20 citaĵoj legeblaj sur folioj en la lingvoj franca, germana aŭ turka, por la lasta el la 4 ekspoziciaj semajnoj ni algluis diverskolorajn slipetojn jam kun la traduka folio. Tiel trovis la respondon ankaŭ la gastoj, kiuj antaŭe dum 3 semajnoj ne postulis de s-ro Murat klarigon pri la uzo de la disponeblaj folioj. Ni, la esperantistoj, ne povis ĉiam ĉeesti, por disdoni la koncernajn testfoliojn.

S-ro Murat Yilmaz estas kurdo parolanta kun sia panjo 81-jaraĝa la kurdan, sed tute prave li atentigas, ke malgraŭ tio lia restoracio estas nek kurda nek turka, sed vere internacia.

Je la ekspozici-inaŭguro inter esperantistoj, kiel skribis Ueli Haenni, oni jam diskutis pri dezirinda plibeligo de la afiŝoj. Sed eĉ kiel ili nunas, ili tamen povus bone taŭgi ankoraŭfoje en nova ekspoziciejo. Kaj li aldonis, ke kiam li restoraciumis dum la ekspoziciaj semajnoj, klarigadante pri la afiŝoj kaj prezentante per kroskomputilo TTT-informojn, li plurfoje miris, ke la junuloj, kiujn li alparolis, plej ofte ne konsciis, ke iel povas ekzisti lingvoproblemoj. Neniam ili estis aŭdintaj pri la eleganta zamenhofa solvo al tiuj lingvoproblemoj. Kiuj jam sciis pri la ekzisto de esperanto kaj la ĵus eksciantoj ofte miris pri la kulturaj ebloj de esperanto. Tial perkomputile Ueli Haenni raportis pri siaj eksperimentoj kaj montris, ke post 2 semajnoj li partoprenos je jarŝanĝo en la dumiljara urbo Xanten en Germanio renkontiĝon kun 150 personoj el 12 landoj, inter kiuj infanoj ankaŭ regantaj esperanton.

Internacia Biologia Olimpiado en Berno 7-14 julio 2013

IBO, tio estas Internacia Biologia Olimpiado okazinta de la 7a ĝis la 14a de julio en Berno, donis al la irana esperantisto Mohammad Karamudini la eblon renkontiĝi kun Bruno Graf kaj Ueli Haenni. Ĉar li deĵoris kiel eksperto kaj tradukisto por la delegacio de sia lando, li disponis pri malmulte da libera tempo dum la daŭro de tiu IBO-semajno, tial la bernanoj bedaŭrinde ne povis inviti lin al la restoracio "*Esperanto*". IBO estas interesa aranĝo ĉiujara. La biologiajn taskojn ĉiu partoprenanto ricevas en sia propra lingvo el vasta elekto inter 38 lingvoj por 60 landoj.

Ĝenevo

Prelego de Stefano Keller

La Esperanto-Grupo « La Stelo » invitis la 22an de majo Stefanon Keller, por ke li prelegu pri la temo Lingvaj Homaj Rajtoj kaj kion faras UEA por defendi ilin? Kiel estrarano de UEA pri la eksteraj rilatoj kaj kiel ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, Stefano Keller, post klarigo pri la ĝenerala situacio koncerne al lingvaj rajtoj

en la mondo, prezentis la diversajn agadeblojn de la komisiitoj de UEA kadre de ties eksteraj rilatoj ĉe UN-oficejoj kaj ĉe Unesko. Konklude sekvis senpretenda babilado pri tiu temo kaj respondoj al demandoj.



Stefano Keller preleganta en la grupo La Stelo

Esperanto en Salono de la Inventaĵoj ĉe Palexpo en Ĝenevo

Tradicie ekde pli ol 40 jaroj ĉiujrintempe okazas en Ĝenevo «Salono de la Inventaĵoj». Apud la flughaveno troviĝas granda halo, kie la inventistoj prezentas siajn novaĵojn. Ĉi-jare ili venis el pli ol 40 landoj.

Svisa Esperanto-Societo kaptis la okazon montri nian lingvon al la vizitantoj kaj ekspoziciantoj. Sonia Daubercies kaj Charlotte Blanc Maillard ricevis tiun taskon. Jam en februaro ili partoprenis renkonton kun la ekspozici-estraro kaj ricevis enirbiletojn kun favora prezo por disdoni ĉirkaŭ si. En siaj kapoj ili havis ideojn pri tiu ekspozicio, sed kiam la 8an de aprilo ili malkovris sian malgrandan budon (3mx2m), tiam ili vidis, ke ne eblos fari ion kiel pasintjare en Vevey. Estis devigo ŝanĝi la planojn. Marde la 9an ili reveturis al Ĝenevo kun sia materialo kaj organizis sian budeton inter 725 ceteraj, inter kiuj multaj estis el Saŭd-Arabio, Koreo, Ĉinio, kaj aliaj el Eŭropo: Rumanio, Germanio, Pollando, Britio, Francio ktp, eĉ el Svislando.

Finfine ili estis kontentaj, ĉar, kiel ili skribis: *Vere estis mirinda montrofenestro por Esperanto. Ni plue citu ilin: Inter la 10-a kaj 14-a de aprilo ni agadis por nia lingvo. Kun granda plezuro ni prezentis ĝin al la publiko, klarigante ĝian historion, facilecon, utilecon, eĉ ĝian belecon kaj kial estas bone lerni ĝin. La disdonitaj enirbiletoj havis grandan sukceson, venis inter aliaj multe da esperantistoj el Laŭzano, Ĝenevo, najbara Francio, ktp. Plej grave estis la interesitaj personoj, kiuj sciis nenion aŭ nur idiotaĵojn pri la lingvo. Kun granda plezuro kaj helpe de Jarlibro, Pasporta Servo, kaj "La Eta Princo", ni montris kaj respondis al la lavango da informpetoj. La vizitantoj povis legi franclingve kolorajn panelojn kaj afiŝojn.*

Dum tiuj 5 tagoj vere estis mirinde por ni montri, ke Esperanto estas vera, plena, facila, belsona, logika, senlima, neŭtrala kaj vivanta lingvo. La vizitantoj estis surprizitaj malkovri, ke ĝi estas parolata sur la kvin kontinentoj. Ni klarigis pri la nombro, utileco kaj tasko de la UEA-delegitoj, la vojaĝmaniero per Pasporta Servo, sen forgesi la kongresojn, renkontojn, gazetojn, librojn, kantojn, ktp....

Por pruvi ĉion ni legis kelkajn liniojn el "La Eta Princo", tiel ili povis aŭskulti la lingvon kaj ties muzikon. Okaze de tiu evento ni vere havis la impreson, ke estis la ĝusta loko por varbi pri nia lingvo. Ni semis, semis kaj esperas, ke la semitaj grajnoj ĝermos rapide el tiu fekunda medio.

-oOo-

Esperanto-renkontoj

Andrei Korobeinikov
elstara rusa pianisto kaj esperantisto.

En gotenburga UK 2003 Andrei Korobeinikov partoprenis kaj ludis pianon por akompani la himnon kaj dum Internacia Arta Vespero. Brile. Li estis 17-jara. Tiam mi konatiĝis kun li. Jam en la zagreba UK en 2001 li ĉeestis. Mi revidis lin en la pekina UK. En 2006 en la florenca UK li havis tutan koncerton por si mem, li ne plu estis unu el la amatoraj artistoj de la Internacia Arta Vespero.



Mi iris al Saanen (Gstaad) por aŭskulti lin en januaro 2010. Dum postkoncerta babilado li anoncis al mi fiere, ke li ludos baldaŭ en Parizo en Théâtre des Champs Elysées. Mi iris tien en marto 2010 por ĉeesti tiun eventon ; denove estis grandega plezuro aŭskulti lin, lian brilan teknikon, lian sentemon, lian emociplenan interpretadon. Per lia retejo mi sciis, ke li ludos en junio 2013 en la festivalo *Cully Classique* kaj mi iris kun miaj du filinoj al Cully apud Lausanne. Plena salono por li, granda sukceso, varmegaj aplaŭdoj kaj laŭdoj, agrabla babilado postkoncerta.

Andrei Korobeinikov parolas diversajn lingvojn : la rusan, la francan, la anglan, la italan kaj esperanton (minimume). Li estas aparte modesta kaj trankvila. Tamen aŭskultantoj komparas lin al Sviatislav Richter kaj al aliaj famegaj majstroj. Kiel pianistoj kvazaŭ devas, li ludas ĉion parkere. Mi parolis al li pri la fama ĝeneva konkurso « *Concours international d'exécution musicale* » fondita de mia praonklo Henri Gagnebin. Li diris tute simple : mi ne bezonas tian saltbreton, jam mia kariero estas survoje. Kaj vere, vidu lian retejon <http://www.korobeinikov.com/31.html>

Li apenaŭ povas iom ripozi inter du koncertoj.... Plie li devas provludi kaj plivastigi sian repertuaron....


Li eldonis 4 KD-ojn ĉe Mirare, Naxos kaj Challenge. Plie ekzistas 4 aliaj KD-oj eldonitaj de AK-AK : Amikara Klubo de Andrei Korobeinikov, lia japana amikaro.

Francisko Randin el Lausanne realigadis intervjuon de Korobeinikov en gotenburga UK en 2003 ; intervjuis la junan pianiston alia pianisto Jean-Thierry von Büren. Temas pri 18-minuta vidbendo.

Mi ofte aŭdas Andrei sur la televida kanalo MEZZO. Ĉiam kun grandega plezuro.

Mireille Grosjean

-oOo-



Al kongresoj kaj vivo tuthomara

JES : Junulara Esperanto-Semajno

La vintra, novjara, junulara, internacia renkontiĝo JES okazis por la kvara fojo, organizita de la pola kaj de la germana esperanto-junularaj asocioj. Ĉi-foje ĝi okazis en Naumburg, Germanio, de la 28a de decembro 2012 ĝis la 4a de januaro 2013. Venis pli ol 250 partoprenantoj, ĉefe junaj sed ne nur, el tuta Eŭropo. Multaj organiziĝis por vojaĝi grupe, kio certe pli agrablas, el sia loĝloko aŭ el hejmo de konatoj. Mi rakontos nun mian propran sperton pri tiu renkontiĝo, kiun mi travivis kadre de dusemajna iom aventura vojaĝo. (Fakte ofte esperanto-vojaĝoj estas iom aventuraj, kaj tion mi ŝatas !)

Vendredon la 21an de decembro mi foriras de Svislando sud-okcidenten, kvankam Naumburg situas nord-oriente de mia urbo. Strange, ĉu ne ? Tamen estas bone tiel. Mi alvenas vespere en la ĉarman sudfrancan urbeton Orange. Tie mi pasigas kvin

tagojn ĉe Céline, esperantista amikino. Ni festas Kristnaskon, promenas en la regiono, vizitas iom...

Komuna vojaĝo komenciĝas merkrede je 14h00, kiam Marion, junulino, kiu eklernis esperanton lastan septembron, retrovas nin alvenante el Montpellier. Ni ekveturas triope per la aŭtomobilo de Céline, ni haltas en Lyon, kie aliĝas Alekĉjo kaj Anna. Per nun plena aŭto ni daŭrigas al Strasburgo, nia hodiaŭa celo, ŝanĝante de tempo al tempo la ŝoforon.

Rapide noktiĝas, vojaĝo daŭras, ĝis fine je ĉirkaŭ 23h00 ni atingas la Alzacan ĉefurbon, kaj tie la okupotan domon *Maison Mimir*. Kuirejoj malpuras kaj vivspacoj malordas, sed homoj simpatias kaj almenaŭ ni povas senkoste tranokti en malvarma dormo-ĉambro sub neizolita tegmento. Kiel ni dormas, tio estas alia afero !

Antaŭ la granda foriro per trajna karavano organizita de Alekĉjo, kiu kondukos nin al la JES, ni havas unu tagon por viziti Strasburgon. Malnova urbo, fermita katedralo, promeno laŭ kanaloj kaj ĉarmaj tipaj domoj, observo de kluzo... Kaj vespere nia grupo pli kaj pli multnombriĝas kun la alveno de Tim el Britio, kaj poste de ĉirkaŭ dek-kvin parizanoj kiel Armelle, Gijom, Wiliam... Ni jam feste manĝas flamkukojn en restoracio.

Vendrede matene ni rendevuas ĉiuj en la stacidomo. Aliaj grupoj alvenas trajne por formi kun ni nun 30-personan karavanon. Per germana trajno ek plu norden kaj orienten.



Karavano survoje al la renkontiĝo. De maldekstre : Gijom, iu slava esperantisto, Anna, Marion, Alekĉjo, kaj la du svisoj Mélanie kaj Luko.

Dormetoj, diskutoj, ludoj, muziko, pikniko... Kun geamikoj la tempo rapide pasas eĉ en trajno, kaj post dek horoj ni alvenas en Naumburg. En la stacidomo retrovas nin alia karavano, tiu el Nordokcidento. Por nia 60-opo urba tramo estas rezervita, ĝi kondukas nin tra la nokto al la proksimeco de nia junulargastejo, kiun ni devos finatingi piede.

Tempo por saluti geamikojn alvenintajn pli frue, enskribiĝi, trovi sian ĉambron, vespermanĝi, kaj iri al la tiel nomata interkona vespero, jam komenciĝinta. Ĉiuj staras en la iom tro malgranda granda salono kaj oni proponas ludojn, aktivecojn, kiuj devigas paroli kun homoj, kiujn oni eble ne ankoraŭ konas kaj ekscii ion pri ili.

Multaj aktivecoj de plej diversaj stiloj, tagaj kaj noktaj, estas proponataj de volontulaj partoprenantoj dum la semajno. Eĉ ne eblas ĉion partopreni, ĉar ofte okazas pluraj samtempe. Oni do elektu inter ludo, prelego, kurso, dancado aŭ alia prezento. Ekzemple Céline proponas desegnadon. Ŝia celo estas komune ilustru tipajn frazojn kun demandoj kaj respondoj por krei esperanto-instrumaterialon.

Ankoraŭ pri arto, kun Jessica, ni ornamas niajn vestaĵojn, tukojn aŭ sakojn per speciala farbo. Pluraj tiel pentras la verdan stelon, feliĉe ŝi kunprenis sufiĉe da verda farbo! Cetere Wiliam instruas triki.

Michael kaj Dominik alportis „salto-risortojn“ kaj ĉiu povas lerni paŝi per ili. Temas pri objektoj, kiujn oni fiksas al siaj piedoj kaj gamboj altigante sin de ĉirkaŭ 60 centimetroj. Tiuj aĵoj havas risortecon, kiu ebligas agrable paŝi, kuri kaj eĉ salti. Nur necesas akiri kaj konservi ekvilibron, kaj bone ekipi sin per genu-, kubut-, kaj manprotektiloj, kaze ke oni falus. Sed ekzistas tekniko por fali sen doloro, kiun oni tuj lernu.

Kun Nim, ni lernas manieron masaĝi manojn. Po duope ni tiel malstreĉe kaj agrable masaĝas la manon unu de la alia, poste ŝanĝas, kaj reŝanĝas ĝis ĉiuj kvar manoj ricevis la flegojn.

Neil proponas verki rakontojn, Martin prelegas pri fido, Peter pri literaturo, pri ŝanĝo de paradigmoj kaj pri meditado, Veronika pri vojaĝo, kiun ŝi faris de Budapeŝto al Bangkoko kaj pri la esperanto-radio Muzaiko... En debatoj oni diskutas ankaŭ pri aktivado en esperantujo, pri UEA-strategio, pri esperanto en politiko... Kaj pri multaj aliaj temoj movadaj aŭ ne-movadaj.

Se malgraŭ la vasta programo nenio interesas nin momente, ĉiam eblas ankaŭ retroviĝi kelkope ĉirkaŭ tablo en komfortaj foteloj kaj babili aŭ uzi socian ludon.

Krom ĉiuj domaj aktivecoj ni evidente vizitas la urbon Naumburg. Tre bela malnova urbo kun restaĵo de mezepoka muro, katedralo, bela placo kun urbodomo, kaj ĉefe multaj bakejoj kun regionaj bongustaj kukoj. Johannes gvidas nin rakontante pri kelkaj historiaĵoj. Tamen kelkaj ne aŭskultas atente, kaj mi konfesas, ke mi ofte estas el tiuj, ĉar mi preferas simple umi la lokon paŝante, observante, babilante kun miaj amikoj... Foje ni batalas kontraŭ la frosto per ses-opa brakumego, aŭ rifuĝante en bakejon por trinki varman kafon kun kuko.

Vespere ĉiam okazas koncerto vigla kaj danciga en granda salono, kaj poste alia, trankvila en la gufujo dum la daŭre laŭtemuloj dancas en la diskejo aŭ drinkas en la trinkejo. Persone mi preferas la kvietan kaj kandelan etoson de la gufujo, por babili en mallaŭteco trinkante teon kun geamikoj. Laŭ mi tie ankaŭ pli bone eblas ĝui la kantojn kaj atenti iliajn tekstojn. Gijom ekzemple kantas plurajn kantojn, kies teksto indas bone aŭskulti pro poezio.

La anoj de la sveda muzikgrupo “La perdita generacio”, tre simpatiaj sursceneje same kiel por amikece babili, donas ĝojan etoson ĉirkaŭ si per siaj personecoj, spontanemoj, kaj siaj originalaj instrumentoj.

Foje eĉ mi havas okazon uzi mian liron en la gufuĵo. Tute improvize, sed je mia feliĉo la noktaj teumantoj ĉesas paroli kaj ŝajne kun plezuro kaj intereso aŭskultas tiun nekutiman muzikon.

Mi ne forgesu menci, ke meze en la nokto ĉiam projekciiĝas filmoj en la kinejo muntita de Nils kaj Dominik. Ĉiuj filmoj estas subtitoligitaj en esperanto, kaj por unu ili eĉ kreis sonbendon en esperanto. Mi tiam ridetis rekonante voĉojn de esperantistaj amikoj por la rolantoj de Shrek. Tiun filmeton ili amuze montris ne nur en tri dimensioj, sed en kvar ! Tio signifas, ke per lampoj en la kinejo, akvopafiloj, ventumiloj, ili kreis efektojn por meti nin ankoraŭ pli en la etoson de la filmo.

Tiel pasas la semajno ege rapide, kaj jam venas tempo por adiaŭi ĉiujn... Fakte ne ĉiujn, ĉar kun multaj mi denove kunvojaĝos. Por veni ni estis pli kaj pli laŭ la proksimiĝo al la celo, por reveni hejmen estas male : Ni foriras 60-ope, la duono forlasas nin survoje. En Strasburgo ni restas denove nur ses, poste kvar-ope. La sekvan tagon ni reveturas per la aŭto de Céline, kiu bone atendis nin. Ili lasas min en Besançon, kaj jen mi solas en trajno. Kia ŝanĝo ! Tamen bonaj memoraĵoj kaj bona espero revidi ilin konservas mian koron varma.

Luc Allemand.

-oOo-

Sarah kaj Sylvain Meigniez travivis sian unuan aventuron per esperanto okaze de vojaĝo en Rusio

En la "domo sub la arbo" en Moskvo, ni renkontiĝas kun Nikos. Tio estas nia unua kontakto kun Esperanto en Rusio. Nikos invitas nin al babila rondo, kiu okazos je nia forirtago el Moskvo. Unue ni malakceptas, ĉar ni pensas iri al la stacidomo sufiĉe frue. Malgajo aperas ĉe lia vizaĝo. Ni pripensas nian unuan decidon, ĉar ni nun kutimas la moskvan metroon : ni akceptas la inviton kaj li donas al ni la adreson kaj la rendevu-horon. Laŭ Nikos, ni povos iri tien je la 18a horo. Ni pretiĝas kaj, atendante la 18an horon, ni promenas kun niaj dorsosakoj en parko apud la adreso. La rendevu-horo proksimiĝas kaj ni komencas serĉi la domon. La indikoj de Nikos estas tre klaraj kaj ni tuj trovas la apartamenton. La domo similas al multaj aliaj : la ŝtuparo estas sufiĉe kaduka, la malvarma betono odoras malnove kaj la multepezaj metalaj pordoj fermas la apartamentojn de ĉiu etaĝo. Post kelkaj minutoj ni aŭdas voĉojn supren-irante la ŝtuparon. Ni ne plu hezitas kaj sonorigas. La unua provo malsukcesas, ĉar la sonorilo ne bruas. La dua provo estas bona : ni aŭdas la pardon malfermiĝi. Juna virino aperas.

"Saluton ?", ni demandas esperante.

"Saluton" ŝi respondas, sed ŝi ŝajnas maltrankvila. Ŝi turnas sin kaj alvokas iun ruse. Nia gastiganto aperas: li ne estis informita pri nia vizito, sed enirigas nin rapide. Li diras al ni, ke la babila rondo komenciĝos je la 19a horo kaj duono kaj ke li devas ankoraŭ labori kaj purigi la apartamenton. Ni metas niajn vojaĝsakojn en lian vizit-ĉambron kaj ekpromenas en la strato laŭ la montrofenestroj de la tago de Valentino.

Du gravaj notoj : unue, Esperanto malfermas pordojn, kaj konfido tuj establiĝas. Ni tute ne hezitis restigi niajn aĵojn en lia domo. Due, la tago de Valenteno aliformas la restoraciojn ĝis Moskvo !

Ni reiras svis-akurate je la 19a horo kaj duono. Nikos kaj du aliaj homoj okupas la kanapon. Ni sidiĝas kaj iom post iom la vizitĉambro pleniĝas. Finfine 14 tetasoj staras sur la malgranda tablo. Ni dialogas agrable pri nia vojaĝo kaj pri la esperanta lingvo kaj la esperanta vivo en Moskvo.

La tempo kuras, sed je la 21a horo la esperantistoj trankviligas nin kaj retenas nin dum ankoraŭ 30 minutoj. Ni forlasas la apartamenton gajaj, kun papereto, kiu indikas la rektan vojon ĝis la stacidomo. Efektive ni alvenas frue por entrajniĝi. Perfekte!

Ni trajnas dum tri noktoj kaj du tagoj. La tempo flugas. Dormi, manĝi, legi, rigardi la pejzaĝon. La tempo flugas. Ni jam alvenas en Tomskon. Tomsko 1 aŭ Tomsko 2 ? En niaj biletoj estas skribite "Tomsko 2", sed alvenante al "Tomsko 1" ni maltrankviliĝas. Fakte ni rendezuis apud la stacidomo kun esperantistoj, sed en niaj retmesaĝoj ni neniam elvokis plurajn stacidomojn. Relegante rapide nian gvidlibron ni ekscias, ke la ĉefstacidomo estas "Tomsko 1". La trajno haltas. "La vojaĝ-agentejo, kiu vendis al ni la biletojn, certe elektis la ĉefstacidomon" ni opinias. Tamen ni maltrankviliĝas pli kaj pli. Dum 40 minutoj, la haltotempo de la trajno, ni provas trovi la kafejon ĉe la stacidomo, kien ni rendezuis. Ankoraŭ 10 minutoj... Ĉu estas la ĝusta loko aŭ ne? Ni rapide rondiras ĉirkaŭ la stacidomo. Ni ekvidas orientan ornamajon, eble la restoracion, kiu estis priskribita en la retmesaĝoj? Lastmomente ni eltrajngas niajn pakaĵojn.

Orienta restoracio apud la picejo kaj, maldekstre, la kafejo... jes, ni staras en la priskribita loko. Ni devas atendi la rendezuhoron dum du horoj, sed la kafejo estas fermita. Do ni elektas la stacidoman halon. Babilado, legado kaj desegnado disblovas nian timon.

Du grandaj dikaj vintromanteloj ŝajnas rigardi nin. "*Saluton!*" diras al ni Olga kaj Viktor, niaj esperantistaj gastigantoj. Tio estas la komenco de aventuro kultura kaj emociiga. Ili gvidas nin ĝis sia aŭtomobilo. Ni veturas ĝis vendejo, kie ni povas diveni iliajn bonkorojn. Poste la paro veturigas nin hejmen. "*La domo en la arbaro*", jen kiel ili prezentas ĝin al ni. Fakte la domo staras en kvartalo/urbeto apud Tomsko. Ili konstruis ĝin mem. Ili konstante plibonigas la domon : la antaŭĉambro estis vastigita por krei spacon por banĉambro. Viktor eĉ almetis la pordon al la necesejo pro nia alveno. Ni malkovras du kokinojn kaj kelkajn koturnojn apud sportaparato. Ni enloĝiĝas kaj jam sidas por trinki teon. Paro de esperantaj amikoj alvenas. Teumante ni babilas kaj la du paroj elbakas turistprogramon por ni. Kion ni povos fari la venontan tagon ? Morgaŭ estos lundo kaj la plejmultaj muzeoj estos fermitaj. La temperaturo ekstera estas minus 17 gradoj, do ili tute ne povas imagi nin promenante brakenbrake dum la tuta tago. Olga provas telefonvoki la universitatajn muzeojn... sed dimanĉe neniu respondas. La tempo rapide flugas. La amikoj adiaŭas kaj foriras.

Alvenas Konstantin, alinome Kostja, la frato de Viktor. Babilante kaj manĝante, nia programo klariĝas. Ni iras en la dormĉambron noktomeze kun mil rakontoj de Kostja en la kapo.

Ni ekvekiĝas kun la suno, aŭdante la voĉon de Olga, kiu volas akompani nin al la universitato. Abundan matenmanĝon. 15 minutojn buse. La aero estas malvarma. Olga zorgas pri la dikeco de niaj vestaĵoj. Sed niaj subvestaĵoj estas efikaj, pro tio ni timas la hejtadon de la publikaj domoj. Olga paŝas tra la tuta universitata ĉefkonstruaĵo por malfermi ĝiajn etajn muzeojn. Do jen okupado por ni! Ŝi iras laborejen, certe ŝi malfruos, ĉar ŝi helpis nin. Ni vizitas la muzeojn pri etnografio, paleontologio kaj mineralogio.

Post du horoj Kostja venas al la universitato por gvidi nin tra la tuta urbo. Li ofertas al ni sian tagmezan paŭzon. Nia ĉiĉerono kondukas nin tra la urbocentro kaj finfine ĝis la kantino de politekniko, kie ni povas manĝi malmultekoste. Dum ni gustumas nian "Borĉ" (supon), Kostja rapide manĝas kaj elkuras labori. Li instruas en tiu ĉi universitato.

Solaj ni babilas pri la nekredebla kaj ege agrabla akcepto de niaj gastigantoj. Jam la ĉeltelefono elpruntita de Olga sonas: Viktor vokas nin. Li finis sian laboron kaj rendevuas nun kun ni. Post 10 minutoj ni renkontas lin. Jen ni promenas denove en la urbo Tomsko, malkovrante la tradician lignan konstruaron de Siberio. Poste nia gastiganta familio ankoraŭ dorlotas nin: "blinojn" (krespojn el Siberio), pelmenojn kaj dolĉaĵojn. Ni ne mortos pro malsato!

La postan matenon: ripozo. Poste ni veturas buse al la urbo, neakompanataj. Malsimpla afero por fremduloj: demandi ruse la haltejon al ŝoforo malfacilas. Tamen la sistemo estas facile komprenebla: jen buseto, ŝoforo kaj granda tabulo apud ŝoforsidloko. La pasaĝeroj enbusiĝas, veturas kaj, iom antaŭ sia haltejo, metas 12 rublojn sur la tabulon. La kondukisto kalkulas kaj redonas moneron, dum li tenas la direktilon per unu mano kaj duonvidas la vojon. Kostja atendas nin apud la tria haltejo de la ĉefstrato. Ni admiras pliajn malnovajn lignajn domojn. Poste ni vizitas la muzeon pri la historio de Tomsko: ŝipforman ĉambron, princan vizitĉambron, miniaturan fortifikaĵon kaj neatenditan ekspozicion pri Londono kaj "The Beatles". La ĉefintereso de tiu muzeo estas la malnova fajrobrigad-turo. Tie la fajrobrigadistoj povis observi la tutan urbon kaj facile ekvidi brulegon.

"Do universitje", ni diras al la busŝoforo, provante imiti la vortojn, kiujn Kostja instruis al ni. "Kio? Da da!", li respondas. Finfine, ne ŝajnas tro malfacile busi! Ni trovas la grupon, kiu pretiĝas por viziti la botanikan ĝardenon de la ŝtata universitato. Ĉu vi jam rimarkis, ke Tomsko estas universitata urbo?

La vizito en la rusa lingvo komenciĝas: БАНАН - banano... se ĉiuj plantonomoj en la rusa estas same kompreneblaj kiel tiu nomo, ni eble komprenos iom la ĉiĉeronon. Sed Viktor alvenas kaj afable tradukas kelkajn anekdotojn. Poste ni hejmeniras. Ni pensas ripozi, antaŭ nia foriro la venontan tagon. Ni jam vidis multon, lernis multege kaj ankaŭ forĝesis iom. Ni teumas trankvile kun Viktor, babilante pri la sansistemoj en niaj landoj (Viktor estas kuracisto). Olga rehejmiĝas. La paro de esperantistaj amikoj revenas. Alia amiko kaj poste amikino esperantistaj alvenas. Ĉiuj helpas pretigi la manĝaĵon. La gustumado komenciĝas. Kostja alvenas kun sia projekciilo: li proponas rigardi filmojn kun esperantaj subtitoloj. Sed ĉiuj multe babilas kaj Olga decidas, ke ni aŭdos muzikon. "Ĉu vi volas danci?", tiu melodio sekvos nin kelkajn tagojn. Noktiĝas. La geamikoj foriras. Restas niaj gastigantoj, Kostja kaj Saŝa, kiu

estas mirinda biciklisto. Li diras: "*Ĝis minus 22 gradoj ne problemas bicikli. Pli malvarme ol minus 22 gradoj, mi fartas sufiĉe bone sed la biciklo frostiĝas*". Ni elektas rigardi korean filmon. Poste ni rigardas sovetan movbilden filmon : temas pri Ruĝĉapuleto, kiu vojaĝas el Moskvo al Parizo. Kia kultura riĉeco !

Ni dormas malmulte, sed tute bone. Ekal la urbo por promeni lastfoje laŭ la belegaj lignaj domoj kun Kostja. Ni ankoraŭ volas viziti la muzeon pri opreso dum la stalina registaro, malgraŭ la malemo de niaj rusaj geamikoj. Ni diras, ke ni povos iri tien solaj, sed finfine Kostja kunvenas. Ni ne sukcesas scii, ĉu tio estas malfacila afero por li...

Lia ĉeesto estas bona afero por ni, ĉar en la muzeo la anglaj komentoj malmultas kaj estas malklaraj. Elirante la muzeon, nia ĉiĉerono kaj amiko promesas veni al la stacidomo vespere.

Ni enpakas niajn aĵojn kaj Viktor pretigas nian lastan manĝon en Tomsko. Ni jam aĉetis manĝaĵon por manĝi en la trajno, sed ĝi certe ne estos tiom bona, kiel la pelmenoj de Viktor.

Olga kaj Viktor kune venas al la stacidomo kaj "metas" nin en la trajnon. Ni adiaŭas per varma ĉirkaŭpreno.

Finfine Kostja alvenas malmultan tempon antaŭ la trajn-eliro. Li frapas ĉe la fenestro kaj donas al ni mapon. Li afable pretigis itineron tra Krasnojarsko, nia venonta stacio.

En Irkutsko ni rendevuas kun Kostik por festivaleta "*Baikal live*". La esperantisto venas al la bushaltejo kaj kondukas nin en universitatan halon. Ni aŭskultas rusan muzikon. Ni multe aŭdas gitaron kun kanto. Ni aŭdas ankaŭ frapinstrumentojn, tirharmonikon kaj balalajkon. Dankon Kostik, ni ne povus malkovri tion sen lia helpo.

Sarah kaj Sylvain Meigniez

ĵus eklernintaj esperanton per "lernu.net"

kaj partoprenintaj du stud-sabatojn ĉe CDELI en La Chaux-de-Fonds.

Vidu ilian blogon [http : //aventuroj.sarsyl.ch/](http://aventuroj.sarsyl.ch/)

-oOo-

Datoj de la venontaj studsabatoj ĉe CDELI en La Chaux-de-Fonds

Septembre 21, oktobre 19, novembre 16, decembre 14, 2014-januare 18, februare 15,
marte 15, aprile 26, majo 17 kaj junio 21.

Vidu pli kompletan informon sur la paĝo 26a.

Unuaj eĥoj el la ILEI-Konferenco

ILEI havas novan prezidanton

De la 12a ĝis la 18a de julio okazis la 46a Konferenco de ILEI en Herzberg-Sieber, Germanio. La prezidanto de ILEI Stefan MacGill demisiis fine de marto 2013 por kandidatiĝi en la estraron de UEA. Ekde aprilo la vicprezidanto Zsófia Kóródy estis aganta prezidanto. Ŝi deklaris, ke ŝi ne volas prezidi la Ligon. Do la Komitato de ILEI dum la Konferenco devis trovi novan prezidanton kaj elektis Mireille Grosjean, nian kun-prezidanton de SES, al tiu grava funkcio. Ŝi estis elektita per 34 voĉoj el 36 voĉdonrajtaj personoj. Kiel nova prezidanto, en siaj salutvortoj Mireille Grosjean interalie aludis al la dezirindeco okazigi trian Mondan Konferencon pri la Instruado de Esperanto, post la unua tia en Ĝenevo en 1922 kaj la dua en Prago en 1927.

Do nun la estraro de ILEI nombras 9 personojn el 4 kontinentoj. Inter ili estas 6 virinoj.

Ni gratulas al Mireille Grosjean kaj esperas, ke sekve al la dinamisma kaj tre efika prezidanta periodo de Stefan MacGill, per sama viglo kaj entuziasmo ŝi plu kondukos ILEI-n al novaj sukcesoj.

Ni rememorigu, ke la fonda prezidanto de ILEI en 1949 en Bournemouth (Britio) estis s-ino Violet C. Nixon; sekve post sesdeko da jaroj ILEI havas sian duan prezidantinon.

La aliĝpeto kaj statuto de instruista sekcio en Sud-Afriko estis anticipe dissendita kaj montrita; kaj tiel la sekcio povis esti unuanime akceptita. La prezidanto de IEK, la gvidorgano de la internaciaj ekzamenoj de UEA kaj ILEI, fariĝis per unuanima decido s-ro Karine Arakelian el Armenio. La funkcio komisiito pri kandidatiĝo de novaj sekcioj transiris al s-ro Bharat Ghimire el Nepalo. Do nun vere tutmonda fariĝis ILEI.

-oOo-

Unuaj eĥoj el la Islanda Universala Kongreso

Al la norda ĉefurbo Rejkjaviko la 98-a Universala Kongreso de Esperanto altiris 1034 partoprenantojn, kiuj venis el 55 landoj de ĉiuj mondopartoj.

La inaŭguron de la kongreso ĉeestis la islanda ŝtatestro

La 98-a Universala Kongreso de Esperanto estis oficiale malfermita matene la dimanĉon 21-an de julio en la Rejkjavika kongresejo Harpa. La Alta Protektanto, la islanda prezidento Ólafur Ragnar Grímsson, ĉeestis la inaŭguron kaj salutis la kongresanojn per tiuj vortoj :

La idealo pri kuna socio, kreado kaj esprimado sendependa de etna aŭ nacia deveno akompanis Esperanton ekde la komenco, kaj danke al ĝi la movado iĝis unio por paco kaj humaneco.

Dum la nova jarcento la teknologio malfermis multajn dimensiojn en la mondo, translime konektis homojn el ĉiuj partoj de la mondo, kaj favoris la ŝanĝiĝojn en la mondo, inter kiuj la lukton por progresigi Esperanton.

Sekve komenciĝas novaj tempoj kun ŝanco por sukcesoj pli diversaj ol iam ajn antaŭe.

La Universala Kongreso de Esperanto, okazanta nun en Harpa, estas ideala loko por atenti la estontecon, dum ni laŭdas la respektindan ĝisnunan laboron por Esperanto.

Mi kore bonvenigas vin al la kongreso kaj deziras al la movado sukceson en la estonteco.

Krom la islanda prezidento ĉeestis ankaŭ kvar membroj de la Honora Komitato de la Universala Kongreso : ministro pri kulturo Illugi Gunnarsson kaj eksministro pri kulturo Katrin Jakobsdottir, kaj la esperantistoj prof. Sigurður Líndal kaj Baldur Ragnarsson.

Per sia ĉeesto honoris la inaŭguron ankaŭ la ĉina ambasadoro Ma Jisheng, la germana ambasadoro Thomas Meister, la pola aferŝarĝito Lech Mastalerz kaj la rusia aferŝarĝito Aleksej Shadskij. Ĉeestis ankaŭ Ulrich Brandenburg, germana ambasadoro en Moskvo kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, kaj Ragnar Baldursson, konsilisto en la islanda ambasado en Pekino.

Hannes Högni Vilhjálmsson kiel prezidanto de la Loka Kongresa Komitato bonvenigis la kongresanojn al Islando, post kio Claude Nourmont, vicprezidanto de UEA, legis la jam tradician salutmesaĝon de d-ro inĝeniero L. C. Zaleski-Zamenhof, nepo de L.-L. Zamenhof.

La ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak anoncis la novajn Honorajn Membrojn de UEA : Roland Lindblom, Biruta Rozenfelde kaj Hallgrimur Sæmundsson. La kongresanaro omaĝis la memoron de Sæmundsson, forpasinta la 22-an de junio, kaj de aliaj Honoraj Membroj, forpasintaj post la antaŭa UK, per momento de silento.

La ĝenerala direktoro Osmo Buller legis la nomojn de la nova Estraro, kies prezidanto estas Mark Fettes. Sed la inaŭguro estis ankoraŭ gvidata de la malnova Estraro, kies prezidanto Probal Dasgupta por la lasta fojo faris festparoladon.

Novajo en la inaŭguro estis filma paŭzo, kiu pro teknikaj problemoj tamen iom prokrastiĝis, donante spacon al la tradicia muzika paŭzo, kiun plenumis la argentina pianistino Teresita Alaniz. Tuj poste la salono mallumiĝis por la monda premiero de la mallonga animita filmo "Espero" de la reĝisorino Simone Gianpaolo. Tiu filmo estas originale farita en Esperanto, kun la voĉo de Mariana Evlogieva.

Sekvis la salutparoladetoj de TEJO (vicprezidanto Michael Mandirola), ILEI (prezidanto Mireille Grosjean), Akademio de Esperanto (vicprezidanto Brian Moon) kaj SAT (Nikolao Gudskov).

La plej longa sed vigla programero estis la kavalkado de salutoj de la landoj reprezentataj en la UK. Gvidis ĝin la estraranoj Maritza Gutiérrez kaj Amri Wandel. Nome de Svislando salutis Mónica Molnár en la kvar oficialaj lingvoj de la Helveta Konfederacio.

Post komuna kantado de la Himno, prezidanto Dasgupta deklaris la 98-an UK malfermita per la oficiala martelo de UEA, ricevita donace en la 33-a UK en la sveda urbo Malmö en 1948.

Pri la svisoj en la UK

Dudeko da svisoj ĉeestis la UKon. Ili renkontiĝis de tempo al tempo en tiu homamaso de ĉirkaŭ mil homoj, vespermanĝis kune la merkredan vesperon kun kelkaj alilandanoj. Tiam viglaj diskutoj gajaj okazis. La prezidanto de SES aperis kompleta, kiam Didi Weidmann kaj Mireille Grosjean sidis unu apud la alia. La nesvisoj povis konstati, kiom ni bezonas esperanton en Svislando pro la plurlingveco de nia etega lando. Plie la konsisto de la svisa aro estis interesa: Mónica origine hungara, Barbara origine pola, Rosario origine itala, Nelida origine kubana.... Tia estas Svislando !

En la nova estraro de UEA deĵoros Stefano Keller por dua mandato kaj Mélanie Maradan estis elektita membro de la nove fondita Konsilio, helpa organo al la estraro de UEA. Gratulon al ambaŭ.

Pri la respondecoj de la novaj UEA-estraranoj

La nova Estraro de UEA decidis pri la laborkampoj de siaj membroj :

Mark Fettes (prezidanto) gvidas la subteamon "Mastruma Evoluo": Strategia laborplano, financo, Centra Oficejo, kongresa politiko, TEJO, CED, uea.org ;

Martin Schäffer (ĝenerala sekretario) : Komitato, komunika politiko, Delegita Reto, financo kaj administrado (kunlabore kun Fettes) ;

Stefan MacGill (vicprezidanto) gvidas la subteamon "Movada Evoluo": Kapabliga agado (ILEI, edukado.net, aktivula trejnado), Komisionoj pri Oceanio kaj Afriko ;

José Antonio Vergara, subteamo "Konsciigo": Tutmonda Inform-Reto (TIR); Faka agado, Terminologia Esperanto-Centro (TEC), IKU; TEJO kaj CED (kunlabore kun Fettes) ;

Stefano Keller gvidas la subteamon "Monda Evoluo", Konsciigo, Komisiono pri Rilatoj kun Internaciaj Organizaĵoj (KRIO), Ĝemelaj urboj ;

Barbara Pietrzak : Kultura evoluigo (i.a. Akademioj Lingva kaj Literatura, Belartaj Konkursoj), Komisionoj pri Eŭropo kaj Mezoriento/Nord-Afriko ;

Lee Jung-kee: Kapabligo (kunlabore kun MacGill), Novaj landaj asocioj, Komisiono pri Azia Esperanto-movado, E-Centroj.

Elekto de Konsilio

Dum sia lasta kunsido la Komitato de UEA aprobis la starigon de helpa Konsilio kaj regularon difinanta ĝian rolon. La sekvaj konsilianoj estis akceptitaj : Petro Baláž (Slovakio), Heidi Goes (Belgio), Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio), Johannes Mueller (Germanio), Zsófia Kóródy (Germanio), Mélanie Maradan (Svislando), Francesco Maurelli (Italio), Veronika Poór (Hungario), Orlando Raola (Usono), James Resende Piton (Brazilo), Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo), Amri Wandel (Israelo), István Ertl (Luksemburgo) kaj Michela Lipari (Italio).

Premioj de la belartaj konkursoj de UEA en 2013

Poezio : Unua premio : Nicola Ruggiero pro "*Okazis iam*".

Prozo : Unua premio ne estis aljuĝita. Dua premio : Ewa Grochowska pro "*Parentezo*". Tria premio : Jesper Jacobsen pro "*La punĉbovlo de la diablo*". Honora mencio : Ewa Grochowska pro "*Eskapo*". Fakte partoprenis 24 verkoj de 12 aŭtoroj el 10 landoj.

Teatraĵo : Unua kaj dua premioj ne aljuĝitaj. Tria premio : Luiza Carol pro "*Tempo rabita*". Honora mencio : Nikolao Uzunov pro "*Veronia*". Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

Eseo : Unua premio "Luigi Minnaja": Jorge Camacho Cordón pro "*De hajko al hajko*", kaj Lena Karpunina pro "*Aliro al la mistera Jean Ribillard*". Dua premio ne aljuĝita. Tria premio: Dimitrije Janicic pro "*Cent jaroj de originala Esperanto-literaturo en Serbio*". Partoprenis 8 verkoj de 7 aŭtoroj el 5 landoj.

Infanlibro de la jaro: Eldonejo Mondial pro "*La mirinda sorĉisto de Oz*" (traduko : Donald Broadribb). Partoprenis 1 verko de 1 eldonejo el 1 lando.

Okazontaĵoj

Pri la venontaj studsabatoj en CDELI

Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Strato Progrès 33, 2303 La Chaux-de-Fonds.

Buso N° 4 direkto Hôpital, haltejo Bibliothèque.

Datoj de la venontaj studsabatoj

Septembre 21, oktobre 19, novembre 16, decembre 14, 2014-januare 18, februare 15, marte 15, aprile 26, majo 17 kaj junio 21.

Formiĝas 3 studrondoj laŭ la lingvo-niveletoj : tutkomencantoj, mezuloj kaj lertuloj.

Partoprenkontribuo : Fr 15.- (senpage por la studentoj kaj senlaboruloj).

La decembra studsabato disvolviĝos en festa etoso.

Studhoraro : Malfermo : 10h00. Studo ekde 10h30. Komuna tagmanĝo : 12h45. Plia studo : 14h15. Konkludo : 16h30. Oficiala fermo : 17h30.

Surloke aĉeteblas libroj novaj kaj brokantaj.

Por aliĝi aŭ ricevi disdoneblajn informilojn kontaktu Nancy Fontannaz, ĉu rete : nancy.fontannaz@gmail.com , ĉu telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) ne forgesante indiki viajn nomon kaj adreson.

Sprachfestival sur Bundesplatz en Berno

17an de aŭgusto posttagmeze

Mireille Grosjean vestita de Esperanto-T-ĉemizo
disdonos esperanto-varbilojn en diversaj lingvoj.

Kunlaborantoj bonvenas.

-oOo-

Esperanto-stando sur Kasinoplatz en Berno

24an de aŭgusto

Organizantoj kaj deĵorantoj : Benno Frauchiger kaj Mireille Grosjean.

Kunlaborantoj bonvenas.

-oOo-

SFERO

Svisa Famili-etosa Esperanta Renkontiĝo

De la 4a ĝis la 6-a de oktobro en Langnau (Emmental)

Loko centra en Svislando facile atingebla per publikaj transportiloj.

Ĉiujn utilajn informojn vi trovos en : <http://alawa.ch/wp/sfero/>

La organiza teamo Laurent Burgbacher, Vera Pochanke kaj Marion Bélisle.

-oOo-

Komuna ILEI-Seminario 26an kaj 27an de oktobro 2013 en La Chaux-de-Fonds

En sia parolado dum la malfermo de la 98a Universala Kongreso en Rejkjaviko Mireille Grosjean, kiel nova prezidanto de ILEI, substrekis la gravecon kaj oportunecon de komunaj seminarioj translimaj.

Reveninta el Rejkjaviko, kiel prezidanto de Svisa ILEI-Sekcio (SIS) Mireille Grosjean invitas nin al la unua ILEI-Komuna Seminario, kiu celas geinstruistojn, sed ne nur.

Tiu seminario okazos en La Chaux-de-Fonds en la Lernejo *La Grande Ourse*, strato Recrêtes 18. Bonvolu tiucele jam nun rezervi la koncernajn datojn de la 26a kaj 27a de oktobro 2013.

Provizora programo

Komenco **sabate 26an de oktobro** je la 13a horo : Unuhora ĝenerala asembleo de Svisa ILEI-Sekcio. **Ekde la 14a horo** : Programo sekvos. Planitaj estas 4 prelegoj kaj debatoj. Komuna vespermanĝo.

Diversaj tranoktebloj (en hotelo, private, en apuda Francio).

Dimanĉe 27an de oktobro : vizito de CDELI aŭ debato pri la nuna evoluo de la movado. Strategia plano de UEA k. s. Komuna tagmanĝo, fino proksimume je la 15a horo.

Perrete pli preciza programo certe dissendiĝos. Por plia informado direktiĝu al : Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, CH-2416 Les Brenets. Tel. : 032 932 18 88 kaj 079 69 709 66. Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

-oOo-

Tutsvisa kongreso pri pacedukado en Broc (FR) 9-10-ajn de novembro

Mireille Grosjean, kunorganizanto, prezentos esperanto-standon.

-oOo-

Kvina Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) En Kotonuo en Benino ekde la 29a de decembro 2013

Tiu grava renkontiĝo okazos ekde la 29a de decembro 2013 en Kotonuo, Benino. Ĝi daŭros 6 tagojn. Du svisoj aliĝis. Jam aliĝis fine de junio 21 personoj.

Dum la Ĝenerala Asembleo de SES en Staad marte 2013 estis decidite, ke SES subtenu per donaco de 1000 CHF. Plie estis decidita alvoko al la membroj de SES, por ke ili libervole paralele ankaŭ subtenu la alvenon al Kotonuo de afrikaj esperantistoj. Tiu alvoko estis farita fine de majo per la helpo de nia komisiito pri financoj Hans-Werner Grossmann. La donacoj iris al la flava konto de la svis-benina organizo « Scio Sen Bariloj », konto numero 12-752700-3 , kie je la 30a de junio jam alvenis 1150 CHF. 25 membroj de SES kune donacis tiun sumon, ili ricevu niajn plej elkorajn dankojn. Kompreneble pliaj donacoj povos plu iri al tiu konto.

Mireille Grosjean partoprenis kaj la ILEI-konferencon en Herzberg, Germanio, kaj UK-on en Rejkjaviko, Islando, kaj varbis por tiu grava internacia renkontiĝo.

-oOo-

12a Novjara Renkonto kaj 5a NIS por la gejunuloj Saarbrücken 27.12.2013-3.01.2014

Ĉiuj necesaj sciigoj pri la **12a Novjara Renkonto kaj la 5a NIS en Saarbrücken** kapteblas tra la retejo www.esperantoland.org

Plenkreskuloj, infanoj kaj gejunuloj feriemaj en kultura esperanto-etoso kun kursoj, koncertoj, ekskursoj, ktp... nepre partoprenu tiun aranĝon.

-oOo-

Kulturaj paĝoj

*Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20,
2000 Neuchâtel, rischneller(ĉe)gmail.com.*

Pri la enhavo kaj la stilo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

El nia historio

Sviso, Nobel-laŭreato kaj esperantisto

de Jean Amouroux

Mi volas paroli pri Charles-Edouard Guillaume (1861-1938), forgesita en niaj enciklopedioj.

Eminenta fizikisto ĉe Internacia Oficejo de Pezoj kaj Mezuriloj en Sèvres (proksime al Versajlo), Charles-Edouard Guillaume estis allogita al Esperanto de ties direktoro, Jean-René Benoît (1844-1922).

Kun sia familio, Jean-René Benoît partoprenis en la Bulonja kongreso (1905) kaj estis elektita membro de la Lingva Komitato (LK), kies laborojn li aktive partoprenis. Dum la Dresena kongreso (1908), kvankam ne ĉeestanta, li estis nomita aga prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) por la periodo 1908-1909, sed li ne povis akcepti pli pro siaj gravaj okupoj.

Charles-Edouard Guillaume naskiĝis en Fleurier, kantono Neuchâtel, la 15-an de februaro 1861. Instigite, skribis li, de Emile Javal bone konata en nia historio, Guillaume

estis membro de la LK. Jen plia pruvo, ke ne Zamenhof starigis la liston de la Lingva Komitato. Dum kuracrestado, la 31-an de julio 1910, Guillaume skribis al Emile Boirac, prezidanto de la LK, ke li rezignas pri membreco pro tro da okupoj, kiuj eĉ ne ebligis al li ellerni la lingvon. Li tamen certigis, ke por Esperanto li konservas varman simpatian. Margene de la letero, Boirac skribis en Esperanto: « Aldoni noton pri S-ro Guillaume. » Malgraŭ tio Guillaume plu ricevis la cirkulerojn de la LK kaj la 19-an de novembro 1910, en plej simpatia formo, li konfirmis pri sia ekziĝo al Boirac.

En 1915 Guillaume anstataŭis Benoît kiel prezidanton de Internacia Oficejo de Pezoj kaj Mezuriloj kaj en 1920 li ricevis la Nobel-premion pri Fiziko.

Fidela al sia promeso al Boirac, ankaŭ kiel membro de la Patrona Komitato de la Internacia Konfe-

renco por uzado de Esperanto en la puraj kaj aplikataj sciencoj (Parizo 14-17-an de majo 1925), la 23-an de majo 1926, dum la bankedo de la nacia kongreso de Esperanto en Parizo, interalie antaŭ reprezentantoj de tri

ministroj kaj de la prezidanto de la Akademio de Sciencoj, Charles-Edouard Guillaume rediris sian simpaton por Esperanto. Li mortis en Sèvres la 13-an de junio 1938.

"THERMES DE BOURBON-LANCY"
SAONE & LOIRE
Grand Hôtel de l'Établissement

DEPENDANCE DE L'ÉTABLISSEMENT THERMAL
AU MILIEU DU VASTE PARC

SALON DE LECTURE
SALLE DES FÊTES & DE JEUX


ORCHESTRE

ASCENSEUR

LUMIÈRE ÉLECTRIQUE

GARAGE

TÉLÉPHONE N°1



ÉTABLISSEMENT DE 1^{ER} ORDRE
A CÔTÉ DES BAINS. RÉUNISSANT TOUT LE CONFORT MODERNE
200 CHAMBRES



1910 Bourbon-Lancy, le 31 juillet 1910

Monsieur le Président et cher Collègue,

Je vous prie d'agréer l'expression de mes regrets très sincères pour la négligence que j'ai apportée dans les devoirs qu'entraîne l'honneur de ma situation de membre du Lingva Komitato. Lorsque, sur les instances du Dr Javal, j'acceptai de faire partie du Comité, je pensais encore, de très bonne foi, pouvoir rendre quelques services à la cause espérantiste ; mais des occupations de tous les instants ne m'ont pas laissé la liberté de me mettre au courant des questions que traite le Comité, ni même d'apprendre l'Esperanto. Bien contre mon gré, je suis donc resté, après des années, ce que j'étais au début, une non-valeur pour le Comité. J'espérais voir un jour cette situation changer, et c'est dans ce

sentiment que j'ai laissé venir les communications du Comité, auxquelles je pensais pouvoir un jour répondre utilement. Mais, à mesure que le temps passe, l'espoir s'évanouit. L'oeuvre conserve ma très chaude sympathie, mais en ce qui concerne le perfectionnement de la langue, elle reste inefficace.

Le plus simple est donc, Monsieur le Président et cher Collègue, que vous vouliez bien accepter, avec tous mes regrets de vous avoir été d'un si faible secours, ma démission de membre du Comité linguistique, aux travaux duquel j'aurais été extrêmement heureux, si les circonstances me l'avaient permis, d'apporter une plus active collaboration. Je joins à cette prière, Monsieur le Président et cher Collègue, l'expression de ma haute estime et de mon dévouement sincère.

Ch. Guillaume

BUREAU INTERNATIONAL

DES

POIDS & MESURES

Guillaume
2689

Pavillon de Breteuil, SÈVRES (S.-&-O.) le 19 novembre 1910.


Monsieur et cher Président,

Votre lettre-circulaire du 17 de ce mois me fait craindre que vous n'ayez reçu la lettre par laquelle je vous exprimais tout mon regret de ne pouvoir, en raison d'occupations extrêmement absorbantes, collaborer d'une façon efficace à votre oeuvre, et d'usurper ainsi, au sein du Lingva Komitato, une place qui pourrait certainement être mieux remplie.

Lorsque, sur l'aimable proposition de notre Collègue d'alors, le regretté Dr Javal, j'acceptai de siéger dans le Komitato, j'avais quelque espoir de voir les années apporter un allègement à une tâche qui, alors déjà, était fort lourde, de telle sorte qu'il me fût permis de consacrer à l'étude de l'Esperanto des loisirs qui m'eussent mis à même de travailler efficacement à son perfectionnement et à son expansion. Mais les années passent, apportant des charges nouvelles, et rien ne me permet de supposer que je puisse avant fort longtemps, ou même jamais, rendre au Comité le moindre service.

Or je sais par expérience qu'il faut épurer les comités des non-valeurs, sous peine de voir leur travail s'user en frottements internes et en efforts inutiles. Et bien que restant toujours fort attaché à la cause espérantiste, je crois agir sagement en vous priant, Monsieur le Président et cher Collègue, de vouloir bien agréer ma démission comme membre du Lingva Komitato.

Je saisis cette occasion pour vous adresser, Monsieur le Président et cher Collègue, avec mes meilleurs vœux pour le succès continu de votre oeuvre, l'expression de mes sentiments de sincère dévouement.



Recenzoj

Mi ŝatis tiun libron : *Urug*

Nancy Fontannaz

La aŭtorino Hella S. Haasse naskiĝis en Batavio (Ĝakarto) en 1918 kaj mortis en 2011 en Amsterdamo.

Tiu maldika libreto 115-paĝa publikiĝis en 1948 kaj en esperanto en 2012. Ĝi rakontas la vivon de du

knaboj en nuna Indonezio, tiam ankoraŭ sub la premo de Nederlando.

La filo de holanda ĉefadministranto parolas pri sia amiko Urug, filo de enlanda dungito. Ambaŭ naskiĝis en tiu nederlanda kolonio kaj ĉiam ludis kune. Ili travivis multajn aventurojn, kiel ekzemple kun Gerardo la

ĉasisto. La stilo tre plaĉas al mi, kun tiuj belaj priskriboj de la naturo :

(p. 47-48) « *Kun haktranĉilo ĉe la zono kaj litkovrilo ŝnurita sur la dorso, ni malantaŭ nia gvidanto suprengrim-
pis laŭlonge de la krutaj, ŝtonecaj vojetoj en la praarbaro. La grandegaj arbokronoj, malproksime super niaj kapoj interplektitaj kiel ĉiam verda tegmento, nur tralasis sufiĉe malmulte da lumo, tiel ke ni antaŭenmarŝis kiel en la krepusko de akvario. Sub la foliaro pendis akraodoro de malsekaj folioj, de planttavoloj, kiuj malrapide putriĝis ĝis nigra tero. Malvarmega klara akvo susuris inter la arbustaro, en manlarĝaj fluaĵetoj, aŭ kiel riveretoj en fluejo plenplena de rondŝlifitaj grizaj ŝtonoj. Ĉiam oni povis aŭdi la sonon de akvofalo kaj la aero ŝajnis saturita de etaj akveroj. La silento sub ĉi tiu ega kupolo de verdaĵo havis ion minacan kaj efikis ke Urug kaj mi en la komenco ne kuraĝis paroli alie ol mallaŭte. Multo ĉirkaŭe en la ombroriĉaj profundaĵoj de dense surkreskitaj ravinoj, en la trunkoj torditaj kaj karbigitaj de la fulmo, al ni ŝajnis angoriga, sed la maldika staturo de Geraldo antaŭ ni vekis en ni senliman fidon. »*

(p. 31) : « *Ni tra la lunlumo iris al la bordo de la lago. Sento de seniluziigo grimpis en min. Mi ne trovis la egan nigran akvosurfacon de miaj revoj, sed marĉon, flakon preskaŭ, ĉiuflanke ĉirkaŭfermitan de rekte supreniĝantaj montomuroj, dense surkreskitaj de praarbaro. La plumecaj kaj lanecaj arbokronoj klarblue brilis sub la lunhelo. La lago similis al la glima fundo de vazo, kiu havis la formon de stumpigita konuso. Akvoplantoj floris sur la surfaco, precipe laŭlonge de la*

bordoj. La foliaro kaj la lianoj de kelkaj arboj pendis ĝis en la akvon. La milvoĉa zumado de insektoj kaj la krioj de noktobestoj en la praarbaro ŝajnis parto de la impona silento. Super la montopintoj la steloj scintilis kun malvarmega lumo. Mi fikse rigardis al la nigra transa bordo de la lago, kie la foliaro tuŝis la surfacon. Sen peno mi povis imagi ke tie la fiaj fantomoj kaŝadis sin, pretaj por ataki. Kiam Deppoh kaj Danuh partvoje eniris la mallumon, mi hezitante preferis la akompanadon de mia patrino kaj de la aliaj. »

(p. 25) : « *La suno ĵus subiĝis kaj la arboj, kiuj limigis la ĝardenon, akre konturiĝis kontraŭ la ruĝaj nubaroj en la okcidento. Sur la montopintoj ankoraŭ estis lumo. La dormiga zumado de insektoj sonis el la mallumo sub arbustoj kaj arboj. »*

Ekde la komenco de la libro kaj ankaŭ je la fino, la rakontisto miras kaj bedaŭras, ke li ne vere komprenis sian amikon, tiel malsimilan pro aliaj sentemo, haŭtkoloro, supleco, distancemo... Infano, li vere nek konsciis nek sentis diferencon inter iliaj gentoj, sed poste li multe pripensis kaj bedaŭris tiun perditan amikecon. Ekzemple ili havis alian plezuron dum la ludoj : Urug ne estis kruelema, sed mankis al li « *la sento de okcidentulo, kiu ofte indulgas kaj respektas beston pri duonkonscia parencokonscio* ».

Urug ĉirkaŭis sin de samlandanoj kaj forpuŝis lin, la eksterlandanon, la reprezentanton de la malamikoj... Matura Urug eniras la partion de la ribeluloj kontraŭ la eksterlandanoj.

Post studoj en Nederlando la rakontisto revenas al Indonezio kaj penas rekoni la lokon pro la damaĝoj kaŭzita

de la milito. Sed daŭre li konservas en memoro sian amikon Urug kaj iliajn travivaĵojn.

Mi komprenas la sintenon de la rakontisto, kiu ne sentas diferencojn inter la homoj, kontraŭe al Urug kaj liaj enlandaj amikoj, kiuj bezonas lukti por sia libereco kaj konsideras la eksterlandanojn malamikojn... Ankaŭ mi bedaŭras ilian perditan amikecon...

Pri la traduko : Mi bedaŭras, ke Piet Buijnsters ne tradukis la vortojn, kiuj

ŝajnis al li kutimaj, ĉar por ni nederlandanoj ili tre fremdas... Tamen je la fino de la libro ni trovas klarigojn de tiuj vortoj... Mi devis multfoje noti la tradukon en la margĝenon por memori ilin...

Konkludo : Mi havis multe da plezuro dum la legado, do mi konsilas al ĉiuj preni tempon por malkovri tiun agrablan libreton !

Jam en 1951 mi ekaŭdis pri la romano *Urug*

Claude Gacond

Pri tiu romano titolita *Urug* mi jam aŭdis entuziasmajn laŭdojn en 1951 fare de la instruisto Gerard Cool, kiam mi efektivigis pedagogian staĝon en *L'Ecole de l'Humanité* de Paulus Geheeb en la oberlanda vilaĝo Goldern. Sed tiam *Urug* legeblis nur en sia originala nederlanda versio. Per la esperantigo de Piet Buijnsters mi fine povis reale intimiĝi kun romano tiom laŭdata de mia unua esperanto-instruisto. Kaj mi konstatis, ke tiu verko aperinta ĵus antaŭ la sendependiĝo de Indonezio en 1949, restas plene aktuala. Ĝi fakte ne estas simple plaĉa rakonto, sed verko kuraĝa, priskribanta la socian maljustecon en kolonia reĝimo. Tiom longe, kiam ekzistos landoj regataj de aliaj, tiam *Urug* plue aktualos.

Fakte aŭtobiografia estas la verko de Hella S. Haasse komenciĝanta per la frazo *Urug estis mia amiko*, eĉ se ŝi

enkorpiĝis en knabon. El tio la forto de ŝia libro, kiu famiĝis en la metropola lando ĵus perdinta sian kolonion. La indiĝenoj liberiĝintaj el la japana okupado, post la falo de la usonaj atombomboj sur Hiroŝima kaj Nagasaki, plue kontraŭstaris al la nederlanda rekonkeremo armea.

Gerard Cool ankaŭ identiĝis al ambaŭ herooj de la libro, sed ĉefe al *Urug*, ĉar lia patrino estis indonezia kaj plue vivis en Indonezio. Kaj li estis fuĝinta al Svislando pro rifuzo soldate perforte renederlandigi sian liberiĝintan patrujon.

En *l'Ecole d'Humanité* la gelernantoj ŝatis lin, ĉar aldone al sia efika instruado de matematiko, esperanto kaj muziko, dum liberaj momentoj li ĉiam pretis diskonigi siajn vivspertojn responde al studentaj demandoj. Tiam en tiuj hazardaj kunvenoj plurfoje mi aŭdis lin citadi ĉapitrojn el la romano *Urug* laŭ improvizita germanigo. Tiam li ankaŭ ŝatis atesti pri sia deveno dirante al ni frazojn en la ŝatata

indonezia lingvo. Lia patro studcele venigis lin al Nederlando, sed ĉe Gerard restis la ideo, ke poste li rehejmiĝos. Sed la mondmilito tion malebligis.

Klarige al siaj citaĵoj el *Urug*, Gerard Cool atentigis nin pri lingva fenomeno propra al ĉiu kolonia regno : pejorative uzi la leksikon de la indiĝena lingvo. En sia nederlanda restado tiu metropola sinteno suferigis lin, kiam ekzemple nederlandanoj uzis liajn vortojn *babu* aŭ *brandal*, ne por simple diri *vartistino* kaj *knabo*, sed *primitivulino* kaj *bubaĉo*, same *desa* perdis la signifon de *vilaĝo*, favore al *domaraĉo*, kaj eĉ la nederlanda termino *indiĝeno*, kiam temis pri indoneziano, ne plu signifis *enlandulo*, sed *necivilizito*. Gerard Cool prave atentigis nin, ke simila lingvo-sinteno propras al ĉiuj koloniismoj. Ekzemple la arabaj vortoj *bled* kaj *toubib* nun uzataj de francoj ne simple sinonimas al *vilaĝo* kaj *sciencisto* aŭ *kuracisto*, sed entenas aldonan negativan signifon ofendan al la alĝerianoj.

Mi mencias tiun lingvan fakton, ĉar ĝuste en sia libro Hella S. Haasse prave utiligis tiajn vortojn fakte ofendajn al la koloniitoj. Certe la tiamaj nederlandanoj konis la pejorativecon de tiuj vortoj kaj komprenis ŝian verko-celon. Sed mi min demandis, ĉu la nunaj nederlandaj gejunuloj ankoraŭ konas tiujn vortojn malestimajn. Tial mi turniĝis al Ed Borsboom, la verkinto de la interesa enkonduko al la esperantigita eldono de *Urug*.

Al mia demando : *Ĉu al la nunaj nederlandanoj tiuj terminoj restas konataj ?* Ed Borsboom respondis :

Interesa afero estas la uzo de koloniaj vortoj en esperanto-teksto. Vi certe pravas, ke la legado por esperantistoj fariĝas malfacila pro tiaj vortoj, sed ili en la libro ne abunde estas uzataj. Mi ankoraŭ konas la duonon (mi kontrolis) de la listo, sed miaj infanoj tute ne konas tiujn indoneziajn vortojn. La tradukanto kopiis la sistemon de la verkistino. Ŝi enmetis de tempo al tempo tian indonezian vorton en la nederlandlingvan tekston. Pro tio la teksto ankaŭ por nunaj junuloj nederlandaj estas ne facila. Kaj li aldonis : Estas elekto por la tradukanto, kion fari? Mi iam planis traduki la plej faman nederlandlingvan romanon « Max Havelaar », kiu okazas en Nederlanda Hindio. Ĝi enhavas eĉ frazojn en la indiĝena lingvo. Mi siatempe pensis uzi por tio Volapukon. Ĉar tio ankaŭ donas la ekzotikan/nekonatan etoson, kiel la indiĝenaj tekstetoj. La kontrollegantoj cetere akceptis tiajn vortojn kaj ne proponis anstataŭi ilin.

Do estas interese konstati, ke al la junaj nederlandanoj, pro la ekzisto de tiuj vortoj, ankaŭ la legado de *Urug* same malfacilas, kiel al ni esperantistoj. Sed sen la tiamaj klarigoj de Gerard Cool, mi verŝajne ne estus kompreninta, ke plej ofte tiuj terminoj aldone al la tradukaj klarigoj pluse kunportas malestimon uzon suferigan al la knabo *Urug*. Kaj mi dubas ke, sen averto pri la tiama pejorativa uzo de tiu leksiko, multaj nunaj legantoj de *Urug*, ĉu nederland- aŭ esperant-lingvaj, tion reale sentas.

—oOo—

Angêlmondo

Poemo de Conrad Ferdinand Meyer

Esperantigo el la germana de Willy Nüesch, Berno, 2010, 74 paĝoj.

Recenzo de *André Sandoz*

Ĉu vi jam feriadis aŭ almenaŭ ekskursis en la ĉarma regiono de *Engelberg* (OW)? Do, vi divenas: tiu estas tiu ĉi. C. F. Meyer finverkis sian « Engelberg » en 1872. La tiel nomata sepdekpaĝa poemo detalas emfaze tre simplan rakonton okazintan en la 13a jarcento inter loĝantoj de tiu vilaĝo. Willy Nüesch sukcesis esperantigi tiun poemon tre fidele. Al la naŭsilabaj versoj de la originalo korespondas naŭsilabaj versoj de la tradukinto. La rimoj

ĉiam agordiĝas. La vortoj estas simplaj, precizaj, koloraj. Aparta estas la etoso: laŭvice mistika, religia, nava, patruja. La leganto englitas en belan, impresan revon, kie reĝas la timinda monto Titliso. Ĉu revo aŭ reala vivo de niaj prasamnacianoj? Malkovri niajn svisajn verkistojn pere de esperanto? Kial ne? Sed neniu enkonduko akompanas la esperantan tekston. Scivola leganto devos aliloke serĉi informojn pri ambaŭ originalaj verko kaj verkisto. Willy Nüesch, kompetentega tradukisto, decidis esti nur tradukisto kaj eldonisto.

Nova lernolibro por germanlingvanoj

(rs) Planita antaŭ sep jaroj por la jubileo « 125 jaroj Esperanto » aperis nun nova lernolibro de la internacia lingvo por germanlingvanoj. Depost 1985 ne plu eldoniĝis tia kurso akirebla en librejoj. Temas pri la unua lernolibro entute, kiu uzas kolorojn por reliefigi la gramatikajn interligojn. Ĝi celas antaŭ ĉio lernantojn de la duagrada lernejoj kaj studentojn en la aĝo inter 16 kaj 26 jaroj kaj, pli vaste, la generacion kutimiĝantan uzi smartfonojn (tio estas multifunkciaj poŝtelefonoj). Origine ĝi estis konceptita por rekta konekto al interreto kaj partoj de la libro estas

konsulteblaj pere de *www.esperanto-sh.de* kun la solvoj de la ekzercoj, aliaj subtenaj helpoj kaj eĉ retforumo por interŝanĝo de ideoj.


La ruĝa fadeno de la kurso konsistas el malkovro de la nordgermana regiono Ŝlesvig-Holstinio (Schleswig-Holstein). La leganto akompanas la studenton Thade dum busvojaĝo de Flensburg al Dagbüll. La libro entenas 12 lecionojn, krome apartajn ĉapitrojn, kiuj enprofundigas en lingvajn detalojn. Ĉe la fino troviĝas vortaro de la vortoj uzataj en la kurso kaj informoj rilataj al la

organizaĵoj kaj kulturo de la internacia lingvo.

Ĉefcelo de la libro estas la perado de la gramatiko kaj la vortfarada sistemo, ĉar ambaŭ forte diferencas de aliaj lingvoj. Ĉiu leciono komenciĝas per ekzercita teksto, gramatika interludo kaj poste laŭfrazo traduko kun klarigoj. La unuaj kvar lecionoj peras la bazojn de la gramatiko (-a, -o, -j, -n, -i, -as, -is, -os, -e). Ĉiu de tiuj lecionoj entenas liston de la uzataj vortoj. La leksiko de unu leciono estas sendependa de la antaŭaj instrupartoj.

Ekde la kvina leciono la lernanto devas mem trovi la koncernajn vortojn en listo fine de la libro kaj la ekzercitaj tekstoj videble longiĝas. Por ĉiu leciono enkondukiĝas po unu participo, krome pluraj afiksoj kaj ĉio, kio igas Esperanton vivanta lingvo.

La *Esperanto-Lehrbuch* estas serioza lingvokurso por scivolemaj studentoj kaj lernantoj kaj ebligas al ili komparon inter la lernataj fremdlingvoj kun multaj esceptoj kaj la reguleco kaj relativa facileco de la internacia lingvo.



Theodor Wittenberger
Esperanto-Lehrbuch.
Die internationale Sprache in Farbe.
Norderstedt : Books on Demand,
2013. 156 paĝoj.

Kiel vi certe legis sur la paĝo 27a de nuna nuna bulteno, inter la premiitoj de la belartaj konkursoj de UEA, nia abonantino al *SES informas* kaj kunlaborantino **Luiza Carol**, gajnis ĉisomere la trian premion pro sia teatraĵo «*Tempo rabita*». Gratulon !

Eblas aĉeti multajn librojn en aŭ pri esperanto tra la kanalo de la
Libro-Servo de CDELI

Urug de Hella S. Haasse kostas CHF 17.30.

Anĝelmonto de Conrad Ferdinand Meyer, tradukita kaj eldonita de Willy Nüesch kostas CHF 10.-

Sed en via propra librovendejo vi aĉetu la lernolibron de Theodor Wittenberger :
Esperanto-Lehrbuch : Die internationale Sprache in Farbe.



Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luko Allemand
www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Aŭguste

17: **Bern** : Esperanto-arbado sur Bundesplatz.
24 : **Bern** : Esperanto-stando sur Kasinoplatz.
25 aŭ septembre 1 : **Basel** : ESB-kunveno.
31 : **Biel/Bienne** : Postsomera kunveno : Muzeo Robert kaj ŝipado al la Insulo Sankta Petro.

Septembre

1: **Lausanne** : LES-kunveno.
4: **Wil** : EK-kunveno.
21 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
26 : **Basel** : ESB-kunveno : Niaj someraj ferioj.

Oktobre

4-6 : **Langnau** : SFERO.
10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
19 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
26-27 : **Chaux-de-Fonds** : ILEI-Seminario.
28 : **Basel** : ESB-kunveno en St-Louis.

Novembre

9-10 : **Broc** : Stando en kongreso pri pacedukado.
16 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.

Decembre

14 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Festa Studsabato.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
27-2014.01.3 : **Saarbrücken**: Novjara Renkonto.
29-2014.01.4: **Kotonuo**: Afrika Kongreso.

Januare 2014

18 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato..

Februare

10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
15 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.

Marte

15 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato..

Aprile

26 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato..

Maje

17 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato..

Junie

21 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato..

Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

Basel : Esperanto-Societo Basel : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.

La Chaux-de-Fonds : CDELI, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. claude.gacond@ne.ch, tel : 032 967 68 42.

CDELI-Studsabatoj : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy Fontannaz : Rete: nancy.fontannaz@gmail.com, tel : 021 728 31 27.

Lausanne : Laŭzana Esperanto-Societo : CP 246, 1000 Lausanne 22.

www.esperanto-lausanne.ch tel : 021 647 29 28. www.eo-l.ch .

Genève : Grupo La Stelo : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1, tel : 022 771 24 37.

kaj Asocio Esperanto-Genève-Régions : esperantoegr@gmail.com

Wil : Esperanto-Klubo : <http://esperanto.ch/wil>.



Kanti kun entuziasmo en tiu neordinara palaco



sub la talenta gvido de Elisabeth de Mestral.

Atentu ! *La Svisa Kalendaro* videblas sur la paĝo 38a.



Dum la Ĝenerala Asembleo de SES en Staad la 23an de marto 2013